


EL POPOLA ĈINIO

中國報

7

1980





La du ĉefroloj en la filmo

"La Duafoja Manpremo" en filmado

Fotoj de QU WEIBO

La filmo kun zigzagaj intrigoj kaj belaj scenoj pri-
skribas karieron, vivon kaj amon de sciencistoj de la mal-
nova generacio. Ĝin direktas reĝisorino Dong Kena de
la Beijing-a Filmstudio kaj ĝiajn ĉefajn rolojn ludas fame
konataj aktoroj Xie Fang kaj Kang Tai.



La reĝisorino kaj fotistoj interkonsiliĝas pri la fotado.

Fotado de eksteraj scenoj





La reĝisorino inspiras la aktoron.



Interparolas geaktoroj.

EL POPOLA ĈINIO

1980

N-ro 7

(262)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Ĉina fame konata verkisto-esperantisto Ba Jin
de Sun Shuming

SUR LA DORSKOVRILO:

Kvieta Rivereto (Ĉinstila pentraĵo)
de Wang Weibao

KOLORAJ SERIOJ:

“La Duafoja Manpremo” en filmado

La bela Suda Ĉina Maro

Animaloj kaj vegetaloj en Mediteraneo kaj Adriatiko

Ĉinaj lakaj pentraĵoj

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Ĉou en la pekina opero

Agronomia teknikisto He Guangdong

Mistera Lavkuvo

En somero (Stona skulptaĵo)

Ekskurso al Badaling

Kamarado Tito ĉiam vivos en la koro de la ĉina popolo . . .	2
La plej granda kontribuo de kamarado Tito	4
Esperanta ekspozicio en Beijing	5
Gratulon al vi, ĉinaj geamikoj	7
INTER NI: Koraj gratuloj kaj bondeziroj	8
La ĉina agrikulturo en rapida disvolvo	9
Nova fizionomio en ĉina kamparo	14
Vestado de Beijing-anoj	17
KORESPONDI DEZIRAS	19
Lerta	20
La ĉina humura dialogo	22
Bone (Humura dialogo)	24
VIDINDAJ LOKOJ: Hainan-insulo	25
Pri romano de Ba Jin	28
ESP-NOVAĴOJ	32, 47
NIA KULTIVEJO: Jugoslavia Esperanto-Movado	33
Verda urbo Varsovio	36
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Gastado en ŝe-a vilaĝo	37
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La Norden-Ekspedicia Milito	39
TRA LA MONDO	42
POR INTERKOMPREENIĜO	44
KURANTAJ AFEROJ	46
KALEJDOSKOPO	47
KULTURAJ NOTOJ	48

Generala distribuanto: Esperanta
Sekcio de GUOZI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Kamarado Tito

ĉiam vivos en la

koro de la

ĉina popolo



LA forpaso de prezidanto Tito kaŭzis grandan kordoloron al la ĉina popolo. Nokte de la 5-a de majo, en la jugoslavia ambasadorejo en la orienta antaŭurbo de Beijing, duonmaste pendis la nacia flago de Jugoslavio kaj aŭdiĝis funebra muziko. Ĉinaj kompartiaj kaj ŝtataj gvidantoj Hua Guofeng, Deng Xiaoping, Hu Yaobang, Zhao Ziyang k. a. kun peza koro iris al ĝi por kondolenco pro la bedaŭrinda forpaso de prezidanto Tito. Ili kore manpremis kun ambasadoro Mirko Ostojic kaj aliaj jugoslaviaj gekamaradoj kaj kondolencis ilin. Ili diris, ke la ĉina Kompartio kaj la ĉina popolo dividas kun ili la malĝojegon, kaj ke kamarado Tito ĉiam vivos en la koro de la ĉina popolo.

Por funebri pro tiu granda marksisto kaj elstara proleta revoluciisto, la ĉina nacia flago estis hisita duonmaste ĉe Tian'anmen-placo, la pordego de la sidejo de la Ŝtata Konsilantaro, la Ministerio de Eksteraj

Aferoj kaj la Domo de la Popola Registaro de Beijing. Pli ol dekmil popolanoj iris al la jugoslavia ambasadorejo por kondolenco.


En la longa kolono de funebrantoj kun blanka floro sur la brusto troviĝis tri junpioniroj, kiuj iris malrapide en la funebrian salonon de la ambasadorejo. Ili estis Zhang Caihong, Bai Bin kaj Ji Dong, lernantoj de la mezlernejoj de Ritan kaj Hujialou. Kiam kamarado Tito vizitis Ĉinion en 1977, ili prezentis al li aromajn bukedojn kaj prezidanto Tito ĝojege ilin ĉirkaŭprenis. Tiu bela sceno estis gravurita en ilia memoro. Ili staris respektoplene antaŭ la portreto de prezidanto Tito kaj riverencis profunde.

Informiĝinte pri la forpaso de kamarado Tito, verkisto Zhou Erfu, kiu estis en hospitalo pro malsano, tuj iris al la jugoslavia ambasadorejo por kondolenco. Li diris, ke li restis en Jugoslavio pasintjare kaj speciale vizitis la

naskiĝlokon de kamarado Tito. La batala vivo de kamarado Tito donis al li profundan impreson. Li havis profundan sentimenton al kamarado Tito kaj tre bedaŭris pro lia forpaso.

Kiam la informo pri la forpaso de prezidanto Tito atingis Nanyuan-komunumon de Beijing, ĝiaj kadroj kaj membroj tuj dronis en karmemoro pri li. En la jaro 1972, Jugoslavio donacis al tiu komunumo transformatoron kaj pumpilon. Hodiaŭ tiuj instalaĵoj ankoraŭ funkciadas ĉe pumpstacio de la komunumo liverante akvon al verdaj plantaĵoj. La komunumanoj speciale sendis Wang Wenlong, la sekretarion de la kompartia komitato de la komunumo, kaj aliajn kvar kadrojn kiel siajn reprezentantojn al la jugoslavia ambasadorejo por kondolenco.

Guo Yingfu, prezidanto de la Beijing-a Ĝenerala Fervojista Sindikato kaj eksestro de la lokomotivo "Mao Zedong", diris, ke kiam li vizitis Jugosla-



Nokte de la 5-a de majo ĉinaj kompartiaj kaj ŝtataj gvidantoj Hua Guofeng, Deng Xiaoping, Hu Yaobang kaj Zhao Ziyang iris al la jugoslavia ambasadorejo por kondolenco pro la forpaso de prezidanto Tito.

vion kun aliaj en 1977, kamarado Tito intime interparolis kun ili kaj fotis sin kune kun ili. La afableco de kamarado Tito profunde lin impresis. Nun li ankoraŭ konservas kiel trezoron la foton en kiu kamarado Tito manpremas kun li.

La ĉinaj esperantistoj tre amas kamaradon Tito, ne nur pro tio ke li estas intima amiko de la ĉina popolo, sed ankaŭ pro tio ke li estas esperantisto. Rezentantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Redakcio de El Popola Ĉinio iris al la Jugoslavia

ambasadorejo kaj ĈEL skribis al la Jugoslavia Esperanto-Ligo por kondolenco pro lia forpaso.

La nobla figuro de Tito ĉiam restos en la memoro de la ĉina popolo.

Rezentantoj de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Redakcio de El Popola Ĉinio iris al la jugoslavia ambasadorejo por kondolenco.

La 6-an de majo popolanoj de Beijing iris al la jugoslavia ambasadorejo por kondolenco.



La plej granda kontribuo de kamarado Tito



Kamarado Tito interparolis kun patrino de iu martiro, en 1953.

PREZIDANTO Tito estis elstara marksisto. Lia forpaso estas granda perdo por la socialisma afero de Jugoslavio, por la nealianca movado, por la progressa afero de la mondo kaj por la komunisma movado.

La plej granda kontribuo de kamarado Tito al la nuntempa komunismo estas tio, ke li kaj liaj intimaj kunbatalantoj plej frue ekkonis, ke socialismo ne devas esti unuforma. Kombin-

te la universalan veron de marksismo kun la konkreta praktiko de Jugoslavio, li kreis vojon de socialisma konstruado konforman al la stato de lia lando — la socialisman sistemon de laborista memadministrado. Hodiaŭ la influo de la ideo pri tiu sistemo jam fore transpasis la limon de Jugoslavio.

Sub la eminenta gvidado de Tito la malriĉa kaj postgiginta Jugoslavio turniĝis en landon

prosperan, ĝiaj diversaj naciecoj tenis sin en solidareco kaj amikeco kaj Jugoslavio estis multe respektata de la mondo. La spirito kaj faro de Tito longe influados la estontecon.

**Kamarado Hu Qiaomu estas fama sociologia teoriisto, nun laboranta kiel membro de la sekretariejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj prezidanto de la Ĉina Sociologia Akademio. Li vizitis Jugoslavion en nov., 1979.*

Esperanta ekspozicio en Beijing

La ekspoziciejo



EN maja Beijing (Pekino), kiam ĉie pompis printempaj floroj okazis en la pitoreska Beihai-parko, kiu ĉiutage akceptas milojn kaj milojn da ekskurstantoj, Esperanta ekspozicio aranĝita de la Ĉina Esperanto-Ligo, Radio Pekino, Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj) kaj la Redakcio de El Popola Ĉinio, por celebri la 30-an datrevenon de la fondiĝo de El Popola Ĉinio kaj diskonigi Esperanton al la publiko. La ekspoziciejo estis Yuexin-halo sur la monteto meze en la parko.


La ekspozicio estis inaŭgurita en la 22-a de majo. La inaŭguron ĉeestis Hujucz, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola

Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo; Chu Tunan, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj; kaj Zhang Xiangshan, vicedestro de la Propaganda Departemento de CK de KPĈ. Ĝin ĉeestis ankaŭ gvidantoj de aliaj departementoj Wang Zhongfang, Ye Laishi (Ĵelezo), Luo Jun, Jin Zhao, Du Bo, Wu Wentao, Peng Jianfei, Yan Baizhen, Chen Yuan, Sun Yiming, Shao Gongwen kaj Wang Xianzong; fama ĉina tradukisto Ge Baoquan; veteranaj ĉinaj esperantistoj Qiu Ji, Xue Chengzhi (Seĉencz), Chen Zhaoying kaj Tikos; kaj reprezentantoj de la ĉefurba

jurnalistaro kaj geesperantistoj de la urbo.

La ekspozicio estis riĉa je enhavo. Kiam la vizitantoj eniris la ekspoziciejon, ili estis tuj altiritaj de la vortoj skribitaj de prezidanto Mao Zedong en la vintro de 1939 por Yan'an-aj esperantistoj. Ambaŭflanke sur muroj estis vortoj el la parolado de la forpasinta vicĉefministro Chen Yi farita en la Esperanta Labor-kunveno en 1963 kaj la vortoj de la granda ĉina literaturisto Lusin per kiuj li esprimis sian aprobon al nia lingvo en la jaro 1918. Ĉiuj iliaj vortoj kuraĝigas la ĉinajn esperantistojn kaj ankaŭ inspiris la vizitantojn.

Estis ekspoziciataj ekzempleroj de EPĈ en ĉiuj tempoj post ĝia



Parto de la ekspozicio

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj(m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	25.8	11600*
			43.7	6860**
			31.9	9380
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	19.3	15510*
			41	7315**
			30.4	9860
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.6	11685
			19.8	15145**
			19.7	15165*


* Uzata nur en somero kaj aŭtuno.

** Uzata nur en vintro kaj printempo.

fondiĝo, Esperantaj libroj kaj bildlibroj post la Liberiĝo kaj materialoj pri la Esperanta disaŭdigo de Radio Pekino. Ili spegulis la disvolviĝon de la Esperanto-movado en la nova Ĉinio. Aparte okulfrapaj estis la gratulaj leteroj kaj vortoj de diverslandaj legantoj por la 30-a datreveno de la fondiĝo de EPC kaj artikoloj kaj fotoj pri naturaj belaĵoj kontribuitaj de diverslandaj esperantistoj por nia gazeto. Ekspoziciigis leteroj de legantoj de EPC kaj diverslandaj aŭskultantoj de Esp-aj programoj de Radio Pekino kaj prezentiĝis informoj pri aktivecoj de entuziasmaj perantoj de la ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj. Inter la ekspoziciaĵoj estis ankaŭ objektoj kaj bildoj donacitaj de diverslandaj esperantistoj. Profunde impresis la rigardantojn kelkaj grandaj grafikoj pri dislokiĝo de legantoj de EPC kaj aŭskultantoj de la E-programoj de Radio Pekino k. a.

En la ekspoziciejo aŭdiĝis de tempo al tempo belaj Esperantaj kantoj surbendigitaj. Tie ankaŭ vendiĝis la broŝuro "Kio estas Esperanto?" kompilita kaj eldonita de la Ĉina Esperanto-Ligo. Ĝi vekis grandan interenson ĉe la rigardantoj. Ĉiutage la ekspozicio akceptis tre multajn vizitantojn, kaj nemalmultaj el ili notis sian opinion en la vizitlibro.

La ekspozicio fermiĝis la 2-an de junio.



Gratulon al vi, ĉinaj geamikoj



T. Plačkovič (Jugoslavio)

Esprimi, ĉifoje, siajn impresojn, opiniojn aŭ proponojn, kiam vi celebras la 30-jaran datrevenon de la fondiĝo de nia (jes, ankaŭ de nia) "El Popola Ĉinio", ne estas facila afero eĉ por spertuloj pli bonaj ol mi.

Miaj pensoj, rememoroj, abundas tiom multe (ja mi mem "vivas" kun EPC preskaŭ de ĝia komenco), kaj spite al tio, el la profundo de mia koro kaj animo mi sentas sufiĉon nur diri: Gratulon al vi, karaj ĉinaj geamikoj!

Nu, tamen, ĉar mi ne estas nur simpla leganto de EPC, sed, ankaŭ (kaj preskaŭ 10-jara) peranto, mi sentas devon, tamen, diri kelkajn vortojn pli.

Unue, mi devas esti memkritika, ĉar ne ĉiam mi agis tiel kiel mi devis kaj povis. Do kreu, mi ĉifoje promesas al vi, kaj ne nur al vi, ke mi klopodos, venonte, esti pli diligenta, laborema, agema.

De kiam vi detronigis tiun kvarpersonan bandon (dank' al la fidela kaj forta anstataŭanto de la granda Mao Zedong) estas okulfrappe videbla renaskiĝo ankaŭ de nia EPC!

Kompreneble, mi ne pensas diri ke vi venis al la pinto de aliaj mondfamaj revuoj, gazetoj.

Iamaniere vi eĉ transsaltas pluraĵojn de ili, precipe je teknikaj aferoj (ĝenerala aspekto, papero, foto...) kaj, aparte, koncerne la koston, prezon... Enkonduko de viaj novaj rubrikoj — sufiĉe parolas je si mem!

Do, laŭ mi: Ne ŝanĝu la nomon de la gazeto, ne tuŝu la formaton (aspekton), sed al ĝia belega, alloga vestaĵo ĉiam pliriĉigu la enhavon ne timante ankaŭ ĝis nun "tabuo"-temojn, ilustraĵojn.

Ankoraŭ mi aldonas: Ne verku tro longajn artikolojn, raportojn, precipe kiam vi akompanas ilin per tiom belaj ilustraĵoj.

Kompreneble, ĉar EPC aperas monate, ĝi ne povas esti tiom

aktuala kiel semajna aŭ taga gazeto, sed tamen, iun resumon vi povas doni, elektante tion kion serĉas modernaj, mondaj legantoj, kaj laŭ stilo: Esti rapide informa, distra, instrua...

Vivu, vivu amikeco inter niaj popoloj, inter ĉiuj popoloj!

de T. Plačkovič,
Jugoslavio

Kunlaboru!

TRADUKO aŭ alimaniere bonvolaj utiligoj de materialoj en nia gazeto estas permesataj kaj dezirataj. Ni petas nur, ke oni notu la fonton kaj sendu al ni 3 ekzemplerojn de la gazeto aŭ alia presaĵo, en kiu ĉerpajo aŭ

tradukajo el nia gazeto estas aperigita, kaj fotojn pri ekspozicioj en kiuj niaj eldonaĵoj estis montritaj. Per tio vi helpas ne nur nian gazeton, sed ankaŭ la Esperantomovadon en Ĉinio.

LA RED.



Koraj gratuloj kaj bondeziroj

Dum preskaŭ 30 jaroj "El Popola Ĉinio" kaj la Fremdlingva Eldonejo fidele servis samtempe Ĉinion, per diskonigo de via kulturo, kaj Esperanton, per eldonaĵoj kies lingvaĵo ĉiam estas modela, eleganta kaj ofte faka: la faklingvaĵo de nia lingvo multe profitis el la aktualaj bezonoj de via informado.

Bonvolu akcepti, karaj amikoj, en la nomo de nia Estraro, miajn tre sincerajn bondezirojn.

de **M. W. Anld**, prezidanto de Akademio Esperanto

Estu certa ke via leginda revuo ege kontribuas tra la mondo en la aprezado kaj konigado de via ĉarma lando. Dank' al Esperanto, ni en malproksima lando povas legi kaj scii pri via granda lando kiu tre tre alproksimiĝas al ni pere de la internacia lingvo.

de **Ramon Molera** (Hispanio)

Tiamaniere mi deziras elkore dank' al vi pro la regula sendado de via interesa kaj bela revuo EPC. Ĉiam kun malpacienco mi atendas la sekvontan numeron de ĝi. Mi legas multe da Esperantaj revuoj, sed neniu el ili plaĉas al mi pli, ol ĝuste la ĉina. Dank' al EPC mi povas ekkoni la ĉinan kulturon, historion, geografion, kutimojn, kiel ankaŭ ekscii pri Esperanta movado en via lando ktp. Rigardante belegajn, kolorajn fotojn, mi trovas ilin ĉiam mirindaj.

de **Liliana Palezewska**
(Pollando)

Vian gazeton mi plejparte legis. Mi nun ĝojas kaj plene fidas la es-
tontecon de "nia" gazeto El Popola Ĉinio.

Via gazeto portas novan energion en Nian Movadon kaj certe kontribuos al ĝia evoluo por paco kaj tutmonda homkulturo.

de **Guy B. Tordoff** (Britio)

Kun atendo mi ĉiumonate atendas riĉenhavan gazeton "El Popola Ĉinio" plej altan en tuta mondo.

Se vi konsentus miajn kelkajn proponojn, ĉiuj japanaj legantoj pli ĝojos kaj legos pli profunde.

1) Pri landnomo, ekzemple: Jipopolanoj en la granda Liangshan-montaro, Sichuan-provinco. . . Ni ne povas serĉi lokon. Se vi montrus sur margeno simplan landkarton, ĉiuj legantoj sentus profundan intereson.

2) Se vi skribos pli ofte artikolojn pri japano kaj Japanio, ni ambaŭ amikiĝus pli profunde.

de **Hazimu Kitagaua** (Japanio)

Mi kaptas la okazon por esprimi mian plenan kontentecon pri EPC, kies abonanto mi ja estas de multaj jaroj. En lasta tempo okazis vere gravaj ŝanĝoj en la tendenco de la enhavo, precipe per plivariecigo kaj per mildigo de la severa ideologia doktrineco. Mi komprenas el tio la pli grandan liberecon kaj la deziron kontakti kun eksterlanda legantaro sur ĉiuj ebenoj.

En kombino kun la ĉiutagaj elsendoj de Radio Pekino, kiujn mi aŭskultas kun plezuro kiel eble plej ofte, via gazeto, subtenate per

la multaj belaj bildoj, donas vastan superrigardon pri la nuntempa Ĉinio, sed ankaŭ pri ĝia antikva kulturo.

de **H. Nischwitz** (FRG)

Veran revelacion signifis mia renkontiĝo kun El Popola Ĉinio. Inter la tiamaj E-revuo, ĝi ŝajnis al mi la plej serioza, la plej zorge eldonita kaj, precipe, la plej malmultekosta. Per nur kelkaj lejoj mi ricevis la tutan jaron la belaspektajn numerojn de EPC.

Okaze de la 30-a datreveno de EPC, mi kore gratulas ĉiujn sindonemajn redaktorojn por la valorega laboro, per kiu ili sukcesis kontribui al paca atmosfero kaj pli bona interkompreniĝo de la popoloj. Novajn sukcesojn mi deziras al unu el la plej prestiĝaj E-revuo.

de **Toma Macovei** (Rumanio)

Mi volas gratuli vin pro la konsiderinda plibeliĝo kaj pliboniĝo de via revuo. Ĝi iĝis en multe pli granda skalo esperantorevuo, tamen pro tio ne malpli bone konigante vian landon kaj vian popolon.

Mi abonas vian revuon jam de 1958 sed neniam legis ĝin kun pli granda plezuro ol lastatempe.

de **Hector Boffejon** (Svisio)

Ekde hodiaŭ mi propagandas favore al via multflanke alloga revuo. Mi estas ravita de tiom vastskala kaj varia titolaro, ĉiu afero pli interesoaltira ol la antaŭa! Oni devas bremsi por ne finlegi la tutan revuon dum unu nokto. . . ĉar oni forgesas dormi! Plonĝinta en Ĉinion oni jam songas ĝis leviĝo. Kiom utilas Esperanto!

de **G. O. V.** (Brazilo)



Traktoroj produktitaj de la Zunyi-a Traktora Fabriko, Guizhou-provinco

La ĉina agrikulturo en rapida disvolvo

de HU MENG

POST la Liberiĝo, la agrikulturo de Ĉinio havis relative grandan disvolviĝon kaj ĝia grena produktokvanto preskaŭ duoble kreskis. Tamen tio ankoraŭ ne povas adaptiĝi al la bezono de la kvar modernigoj de la lando. En vintro de 1978, la Tria Plena Sesio de la Dekunua Centra Komitato de la Komunis-

ta Partio de Ĉinio faris gravan rezolucion pri rapidigo de disvolvo de agrikulturo. La praktikado de la rezolucio tra la lando akcelas tiun disvolvon.

REORDIGI LA STRUKTURON DE AGRIKULTURO

Hodiaŭ, vojaĝante al diversaj lokoj de la ĉina kamparo, oni

povas vidi novajn fizionomiojn de agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, flankokupo kaj fiŝado. Tia prosperiĝo aperis ne tre facile.

Ĉinio estas lando kun plej granda loĝantaro, tamen ĝiaj agroj okupas nur dekonon de ĝia totala areo. Tial la problemo

de greno ĉiam restas grava por Ĉinio. Kiam naskiĝis la nova Ĉinio, iuj fremduloj "antaŭdiris": Ankaŭ la komunista registaro ne povos solvi la problemon de greno de centmilionoj da ĉinoj same kiel la antaŭaj ĉinaj regantaroj. Por solvi tiun problemon, la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro unue faris agraran reformon en la kamparo, poste disvolvis la movadojn de agrikultura kooperigo kaj popolkomunumigo por efektiviĝi agrikulturan kolektivigon. Dum tio oni metis agrikulturon sur la unuan lokon de disvolvo de la nacia ekonomio. Dank' al tio la grena produktokvanto de la lando multe kreskis kaj la problemo de greno por ĉiu ĉino estis solvita.

Estis prave, ke en la pasintaj 30 jaroj la popola registaro tre atentis produktadon de greno. Tamen, multaj lokoj tro emfazis "preni grenon kiel ĉefĉeneron", ignorante disvolvon de forstokulturo, brutobredado, flankokupo kaj fiŝado. La plimultigo de grenkampoj ruinigis arbarojn, akvejojn kaj forcejojn kaj detruis ekologian ekvilibron. Iuj lokoj suferis seriozan erozion, aliaj atakon de sablovento, kaj triaj reduktiĝon de atmosferaj precipitaĵoj. Kvankam la grena produktokvanto pliiĝis portempe, tamen la forstokulturo, brutobredado, flankokupo kaj fiŝado estis serioze fuŝitaj.

Troemfazo de produktado de greno kaŭzis ankaŭ misproporciojn kaj neracian strukturon de agrikulturo. Ĝis la jaro 1978, la produktovaloro de plantado (agrikulturo en mallarĝa senco) konsistigis 67.8% de la totala produktovaloro de agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, flankokupo kaj fiŝado, kaj tiu

de forstokulturo, brutobredado, flankokupo kaj fiŝado nur 32.2%. La produktovaloro de greno konsistigis 66% de la produktovaloro de plantado, kaj tiu de kotono, kanabo, oledonaj kaj aliaj industriaj plantoj nur 34%. Tia agrikultura situacio influis rekte la disvolvon de la malpeza industrio, akumuladon de ŝtata konstrua fonduso kaj provizadon de almanĝaĵoj.

La praktiko montris, ke estas unuflankeca penso tro emfazi plantadon en agrikulturo kaj produktadon de greno en plantado. Por samtempe disvolvi la kvin flankojn, oni devas plene utiligi miliardojn da muoj da herbejoj (1 muo = 1/15 hektaro), miliardon kaj iom pli da muoj da dezertaj montoj kaj multegon da lagoj kaj malprofundaj maroj. La Partio kaj la registaro serioze resumis la pasintajn spertaĵojn kaj ĉerpis el tio lecionojn kaj reasertis la principojn "Samtempe disvolvi agrikulturon, forstokulturon, brutobredadon, flankokupon kaj fiŝadon" kaj "Fari ĉiuflankan disvolvon prenante grenprodukon kiel ĉefan taskon; fari racian koncentradon laŭ lokaj kondiĉoj".

Nun la ŝtato sin preparas por konstrui bazlokojn de greno, de forstokulturo, brutobredado kaj fiŝado, kuraĝigas disvolvon de vilaĝaj industrio kaj flankokupo per lokaj materialoj, kaj disvolvas movadon de plantado de arboj kaj planas konstrui kontraŭventan forstan zonon en norda Ĉinio. En la jaro 1979, polderigo kaj ŝanĝo de arbaroj kaj herbejoj en grenkampojn estis ĉesigitaj. Laŭ la kondiĉo de gren-produktado, oni denove kulturis arbojn kaj herbojn aŭ bredis fiŝojn sur la antaŭaj lokoj ne taŭgaj por pro-

duktado de greno. Krome, ili ankaŭ faris novan dispozicion en grenproduktado laŭ loka kondiĉo. Tiel en 1979, kvankam grenkampoj de la tuta lando malmultiĝis je du milionoj da hektaroj, tamen la produktokvanto de greno pliiĝis je 27,350,000 tunoj, tiu de kotono je 40,500 tunoj, kaj tiu de oleplantoj je 1,217,500 tunoj, kaj forstokulturo, brutobredado kaj aliaj flankokupoj ĉiuj havis bonan rikolton. Ankaŭ la enspezoj de komunumanoj plimultiĝis ĝenerale.

VIGLIGI LA AKTIVECON DE KAMPARANOJ

Parolante pri la kaŭzo de riĉa rikolto en ĉiuj flankoj de agrikulturo, oni nature laŭdis la efikajn politikojn alprenitajn de la Partio kaj la registaro, kiuj vekis aktivecon ĉe la kamparanoj.

En la ĉina kamparo estas ĉefe socialisma kolektiva ekonomio de tri-nivela posedsistemo de la produktaj rimedoj en la popolkomunumo, kun posedsistemo de produkta taĉmento kiel la baza formo. La produkta taĉmento estas ĉefa produkta unuo kaj ludas decidan rolon en disvolvado de ĉina agrikulturo. En la lastaj jaroj, superaj instancoj tro multe intervenis en ĝiajn aferojn, pro kio disvolviĝo de agrikulturo estis ĝenata. Nun la registaro stabiligis kontingenton de greno de la produkta taĉmento en longa tempo, konsiderante la interesojn de la ŝtato, kolektivo kaj individuo. Garantante liveron de kontingento de greno la taĉmento povas laŭdezire disvolvi produktadon en ĉiuj flankoj. Neniu rajtas interveni. Tial senprecedence altiĝis

la aktiveco de komunumanoj kaj kadroj.

Por venki tian egalismen ke ĉiuj ricevas saman laborpagon tute egale, ĉu ili laboras bone aŭ malbone, plejparto de la produktaj taĉmentoj praktikas sistemon de respondeco pri produkto, nome terpecon aŭ kamplaboron oni asignas al produkta grupo aŭ individuo kaj donas laborajn poentojn laŭ kvanto kaj kvalito de laboro. Tiu sistemo enkorpigis la socialisman principon "al ĉiu laŭ lia laboro" kaj ricevis aprobon de la vasta kamparanaro.

Nun en la ĉina kamparo la produktaj fortoj de la popolkomunumo ne estas grandaj, la kolektiva ekonomio estas kompare malforta, kaj legomoj kaj almanĝaĵoj bezonataj de la komunumanoj ne estas sufiĉaj. Por solvi tiujn problemojn, la ŝtato decidis disponigi malmultajn parcelojn al terkulturistoj por privata kultivado kaj malmultajn brutojn al paŝtistoj por privata bredado; krome kamparanoj ankaŭ povas bredi kortobirdojn kaj disvolvi hejmajn flankokupojn. Ĉio ĉi tio povas kompletigi la kolektivitan ekonomion kaj plibonigi la vivon de la terkulturistoj kaj paŝtistoj. Tio estas tre profita ankaŭ al la ŝtato kaj kolektivo.

Malfermi foiron estas alia grava ekonomia politiko de la ŝtato por vigligi kamparan ekonomion. Ĉinio havas vastan teritorion kaj multajn naciecojn, kaj la ĉiutagaj vivbezonaĵoj de la popolo estas tre diversaj kaj multspecaj. Estas neeble por la ŝtataj entreprenoj produkti ĉiujn objektojn. Multaj el ili estas produktataj de entreprenoj de ko-

munumoj kaj brigadoj aŭ de kamparanaj familioj. Pro malsamaj kondiĉoj de diversaj komunumoj kaj brigadoj, ankaŭ iliaj produktaĵoj prezentas diversecon, kaj ili devas aĉeti tiujn, kiuj mankas al ili, kaj vendi tiujn, kiuj estas superflujaj por ili. Pro tio ĉu kamparanoj aŭ komunumoj kaj brigadoj ĉiuj bezonas


interŝanĝi produktaĵojn inter si. Tamen la ŝtata komerco ne povas plene kontentigi ilian bezonon. Por solvi ilian malfacilon, la ŝtato permesis malfermi kamparajn foirojn.

Nun en la ĉina kamparo oni praktikas serion da tiaj politikoj konformaj al la tiea ekonomia

Bonspeciaj bovoj taŭgaj por altebenaĵo estas bredataj en pli ol 30 gubernioj de Tibeto.



Anasbredado en Tianmen-gubernio, Hubei-provinco





Manĝo-standetoj ĉe kampara foiro en Sichuan-provinco

situacio, kio stimulas disvolviĝon de la agrikultura produktado. Ekzemple, dum la tiranado de la kvarpersona bando la kampara ekonomio de Sichuan-(Siĉuan)-provinco kun 100-miliona loĝantaro preskaŭ bankrotis, kaj post la frakaso de la bando tiu provinco serioze praktikas la politikojn de la ŝtato pri rapidigo de agrikultura disvolvo. En la daŭro de la lastaj tri jaroj, ĝia produktokvanto de greno plimultiĝis je 6,350,000 tunoj, kaj kotono, oledonaj plantoj, kokonoj, sukerplantoj kaj aliaj industriaj plantoj ĉiuj ricevis bonan rikolton. La vivnivelo de la komunumanoj leviĝis ĝenerale. Ili diris, ke nun multas greno en ilia hejmo, multas mono en la poŝo, multas porkoj en la stalo kaj multas ridoj en la taĉmento. La vivo fariĝos pli kaj

pli dolĉa, se la politiko ne ŝanĝiĝos.

LAŬPLANE MODERNIGI AGRIKULTURON

Agrikulturo estas bazo de la nacia ekonomio kaj influas rekte disvolviĝon de la malpeza industrio de la ŝtato, akumuladon de ĝia konstrua fonduso kaj pliboniĝon de la popola vivo. Tial oni devas plenenergie disvolvi agrikulturon kaj paŝon post paŝo modernigi agrikulturon, kaj nur tiel oni povas modernigi industrion, nacian defendon kaj sciencojn kaj teknikojn.

Por plirapidigi la disvolvon de agrikulturo, samtempe kun restarigo kaj alpreno de politikoj favoraj al la disvolvo de agrikulturo, la ŝtato plimultiĝis investon al agrikulturo kaj levis la

aĉetprezon de agrikulturaj produktaĵoj kaj plifortigis la subtenon al agrikulturo per teknikoj kaj materialoj. De 1979, la monsumo de la ŝtata investo por fundamenta konstruado de agrikulturo leviĝas de 10.7% ĝis 14% de la totala investa sumo por la fundamenta konstruado; la financaj enspezoj de diversaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj estas konsumataj ĉefe por agrikulturo kaj poragrikultura industrio; kaj ankaŭ plimultiĝas monsumo por agrikulturaj fondaĵoj kaj monpruntoj por agrikultura celo. En 1979, la ŝtato levis la prezon de agrikulturaj produktaĵoj aĉetataj de ĝi. Nur tiurilate la ŝtato asignis 10,800,000,000 juanojn por pliigi la enspezojn de la komunumanoj, brigadoj kaj komunumanoj.

Ekipi agrikulturon per modernaj sciencoj kaj teknikoj estas grava rimedo por plirapidigi la disvolvon de agrikulturo. En la lastaj jaroj la ŝtato ne nur plifortigis gvidon al produktado de agrikulturaj maŝinoj, kemia sterko kaj insekticido, sed ankaŭ reordigis kaj restarigis agronomiajn instituciojn. Nun, ĉe la centra nivelo kaj ĉe la nivelo de provinco, municipo aŭ aŭtonoma regiono ĉie troviĝas tiaj institucioj kaj institucioj por teknika disvastigo kaj agronomia eduko. Multaj subprovincoj kaj gubernioj perfektigis agronomian reton. Tiuj institucioj faris multajn sciencajn esplorojn kaj eksperimentojn pri agrikulturaj maŝinoj, insekticido, kemia sterko, specioj de plantoj, pri

kulturado, protektado de plantoj kaj pri kultura sistemo kaj atingis bonan sukceson. Por disvastigi bonajn speciojn, la ŝtato starigis centran kompanion de semoj, kaj ankaŭ multaj lokoj starigis tiajn kompaniojn, por ke la bona semo de hibrida rizo estu vaste aplikata en la sudaj rizproduktaj regionoj, kaj la bona semo de tritiko en la nordaj tritikproduktaj regionoj. Samtempe ankaŭ produktado de agrikulturaj maŝinoj, kemia sterko kaj insekticido havis grandan disvolviĝon. Sole en 1979, grandaj kaj mezgrandaj traktoroj plimultiĝis je 110,000 kaj mantenaj traktoroj je 298,000 kaj tio ludos aktivan rolon por levi la agrikulturajn produktajn fortojn kaj plirapidigi la disvolvon de agrikulturo.

Por modernigi agrikulturon, la ŝtato starigis por provo, en iuj el siaj kultivejoj entreprenon, kiu kombinas agrikulturon, industrion kaj komercon. Tia entrepreno unuigas la agrikulturan produktadon, la prilaboradon kaj la vendadon de agrikulturaj produktaĵoj en unu ekonomian organizon, tiel ke multaj procedoj povas esti forigitaj, la kapitalo rapide cirkuligita kaj grandigita, la produktivo levita kaj la administrado koncentrita. Kun pliboniĝo kaj paŝo-post-paŝa perfektigo, tia provata entrepreno malfermos novan vojon por modernigo de agrikulturo kaj donos valoran sperton por transiro de popolkomunumo kun unu sola agrikultura ekonomio al tia entrepreno.

La foto montras jarfinan distribuon en popolkomunumo de Linchuan-gubernio, Jiangxi-provinco. La tuta familio de Chen Guansheng ricevis, post dekalkulo por greno kaj aliaj materialoj, 2,016 juanojn.



Novaj ŝanĝiĝoj en ĉina kamparo



La aŭtoro (la unua de dekstre) vizitas la familion de maljunulino Li Jing.

ESTIS malfacile por mi diri pri ŝanĝiĝoj de la ĉina kamparo post praktikado de la du dokumentoj** de la Centra Komitato de la Partio. Tial mi volis fari esploron. Sed kien iri por fari tion? Prefere al mia hejmloko Luoyang de Henan-provinco, ĉar mi bone konas tieajn homojn kaj morojn, kaj estas facile por mi informiĝi pri io vera. La 6-an de la unua monato de la luna kalendaro mi vojaĝis al Luoyang trapasante la guberniojn Yichuan, Songxian kaj Linru, kie mi vizitis produktajn brigadojn de dekelkaj popolkomunumoj.

I

La gubernio Yichuan estas kovrata, ĝenerale, de sterilaj montetaj kampoj. Tamen la regiono kun la klara Yihe-rivero kaj la ondantaj Jiugao-montoj montriĝas tre bela. La verdaj ŝtuparaj kampoj sur la montetoj ŝajnas al mi pli intimaj ol la majestaj montegoj. Aparte okulfrapaj estas nove elfositaj sablaj ŝtonoj amasigitaj ĉe kamprandoj. Por prilabori kampojn, oni devas elfosi tiajn

ŝtonojn el ili, kaj tion la diligentaj kamparanoj faris en vintro kaj printempo en la pasinteco. Troviĝas ankaŭ alia kamplaboro, t.e. elfosi herboradikojn el la tero, kiuj penetras profunden sub la teron je preskaŭ du metroj kaj tre malutilas al la plantoj. Jam de longe neniu faris tian penigan laboron. Ŝanĝiĝo estas tio, ke en tiu ĉi jaro ĉiuj sin ekokupis pri elfosado de ŝtonoj kaj herboradikoj.

Mi rimarkis en la gubernio Songxian, ke frumatene iuj maljunaj kamparanoj kun pioĉo sur la ŝultro iras al kampo por fari tian laboron. Mi tre miris, ke ili tiel energie kamplaboras en fruaj horoj nur kelkajn tagojn post la Printempa Festo. Poste mi kunsidis kun kamparanoj en Jiangcun. Ili diris al mi, ke printempe de la pasinta jaro kiam oni komencis praktiki la sistemon pri respondeco***, iuj komunumanoj ankoraŭ dubis pri ĝi. Poste premio kaj puno efektiviĝis en aŭtuno, kaj tuj leviĝis la entuziasmo de la kamparano. Ili diris ankaŭ, ke dum la dek-jara kultura revolucio oni ĉiam alvokis pasigi la Printempan Feston en revolucia maniero.

Se iu volis viziti foiron aŭ parencon dum la festo, li devis peti forpermeson, por ne paroli pri vizito de teatro. Sub tia rigora difino oni sentis korpormecon kaj nature ne havis aktivecon en kamplaboro.

En Huji-brigado de Yichuan-gubernio, maljuna kamparano Hu Tianxiang diris al mi, ke kvankam oni multe rigardis teatraĵojn kaj estis liberaj viziti parencojn en tiu ĉi Printempa Festo, tamen ili neniom prokrastis kamplaboron.

Koncerne al rigardo de teatraĵoj, mi estis mirigita de la fakto: Yichuan-gubernio havas 2 ŝtatajn teatrojn kaj pli ol 80 postlaborajn teatrojn. De la Printempa Festo ĝis la Lanterna Festo (la 15-a de la unua monato de la luna kalendaro) oni prezentis po 2-3 fojojn ĉiutage, tamen tio ankoraŭ ne povis kontentigi la kamparanojn. Kelkfoje eĉ okazis, ke du brigadoj konkuris por inviti al si teatran trupon. Preskaŭ je ĉiu kvina kilometro apud la vojo troviĝis provizora scenejo kaj aŭdiĝis gongado kaj perkutado. Sur la vojo fluis bele vestitaj

viroj kaj virinoj por iri spekti teatraĵojn aŭ viziti foiron aŭ, kun ruĝe lakita korbo, siajn parencojn. De tempo al tempo aŭdiĝis ĝoja babilado kaj kanto.

Tian fenomenon, verdire, mi ja longe ne vidis. Nun mi legis sur la vizaĝo de kamparanoj elkoran ĝojon kaj senĝenecon.

II

Ĉiuj kampoj de Yaling-komunumo de Yiĉuan-gubernio sterniĝas sur montetoj. Ĝin trafis sekegeco en la lasta aŭtuno. Se tio okazus en la pasinteco, oni devus aĉeti grenon de la ŝtato. Tamen dank' al praktiko de la kamparaj politikoj la komunumo akiris senprecedencan riĉan rikolton: La produktokvanto de greno pliiĝis je 15% kompare kun tiu de la jaro

1978, la produktokvanto de kotono pliiĝis je 35% kaj la oledonaj plantoj havis pliprodukton de 66%. Mi venigis kelkajn kamparanojn por informiĝi pri iliaj enspezoj.

La familio de Wang Anwa, komunumano de Beiyaogou-brigado, havas ok membrojn. Ĝi kun 3.5 laborfortoj akiris, en la pasinta jaro, 1,000 kilogramojn da tritiko, 100 kilogramojn da arakido, 5,000 kilogramojn da batato, 550 kilogramojn da maizo kaj 95 kilogramojn da fabo kaj alispecaj grenoj. En la jarfina distribuado lia familio akiris 410 juanojn per vendo de superflua greno, 350 juanojn per vendo de 2 porkoj kaj 290 juanojn per bredado de unu bovo, 18 kokoj kaj 2 ŝafoj, enspezante entute 1,050 juanojn. Tio estas ekzemplo en malriĉa komunumo,

kiu malhavas industrion kaj flankokupon. La komunumanoj ja montris sin tre kontentaj pri tiel rimarkindaj pliproduktoj kaj enspezoj en tiel malriĉa montregiona brigado.

Ankaŭ granda ŝanĝiĝo okazis en Linru-gubernio post praktiko de la sistemo pri respondeco. La hektara produktokvanto de kotono de Dingzhuang-brigado en tiu gubernio en la jaro 1977 estis 240 kilogramoj, kaj la plej alta hektara produktokvanto de kotono en tiu loko neniam superis 300 kilogramojn. En 1978 oni praktikis la sistemon pri respondeco kaj difinis la hektaran produktokvanton je 450 kilogramoj. La produktaj kvotoj estis distribuitaj inter la individuoj. Rezulte de tio la hektara produktokvanto atingis 645 kilogramojn. La komunumo,

Sterkado





Pasintjare la familio de Liu Baojian kun kvar membroj perlaboris 1,007 juanojn.

manoj praktikis tiun sistemon plue en la pasinta jaro kaj la hektara produktokvanto estis 975 kilogramoj. Sekretario de la partia filio de tiu brigado Li Erchang diris: “Nun la kamparanoj laboras kun granda entuziasmo. Por ne perdi tempon ili eĉ prenas tagmanĝon sur kampo. Ankaŭ maljunuloj kaj infanoj eliras por helpi kamplaboron.”

III

Estas evidente, ke leviĝis laborefiko kaj altiĝis la kvalito de kamplaboro post praktikado de la kampara ekonomia politiko. Sed iuj kamaradoj maltrankviliĝis pri polarizo en la kamparo. Mi konsultis vilaĝanojn, kaj ili opiniis malsame.

Komunumano Hu Tianbang de Yichuan-gubernio diris al mi: “Ne povas esti polarizo, sed nur tio, ke iuj familioj riĉi-

ĝas frue kaj aliaj malfrue. Nun ne estas ekspluato, kaj ĉiu ricevas laŭ sia laboro. Efektive, praktikado de la sistemo pri respondeco plimultigis enspezojn de ĉiuj komunumanoj. Iuj familioj, kiuj devis prunti monon de la brigado ĉiujare en la pasinteco, jam ne bezonas monprunton ĉi-jare.”

Nun vere estiĝis en la kamparo nemultaj riĉaj familioj, kiuj plimultigis la enspezojn dank’ al sia laborado. La 66-jara komunumano Li Weilin de Linru-gubernio aĉetis azeninon en novembro de 1978. Post kvar monatoj ŝi naskis idon. Li vendis la idon kaj per tio akiris 85 juanojn. Poste li aĉetis malgrasajn ĉevalon kaj azenon, bone bredis ilin kaj poste vendis ilin kontraŭ 486 juanoj. Li ankaŭ bredis grasan porkon kaj ĝin vendis kontraŭ 150 juanoj. En

nur 15 monatoj la maljunaj geedzoj enspezis pli ol 700 juanojn. La homo kun duonlabora kapablo, kiel Li Weilin, antaŭe estis ŝarĝo de la brigado, sed nun kreis riĉaĵon por ĝi. Li diris emocie: “La partiaj politikoj plibonigis mian vivon!”

La produkta brigado prizorgas la militistajn familiojn, al kiuj mankas laborforto. Tion aprobis la amasoj. Ili ankaŭ ne montris malkontenton kontraŭ tio, ke la brigado organizis iujn homojn por helpi la vilaĝajn familianojn de laboristoj, kadroj, instruistoj kaj kuracistoj, kiuj havas efektivajn malfacilojn. La kamparanoj havas profundan komprenon pri la principo “ĉiu ricevas laŭ sia laboro”. Vere ekzistas kelkaj spekulantoj post malfermo de la kampara foiro. Rigardate el la tuta situacio, la foira malfermo vere vigligis la kamparan ekonomion. Ĝi ne nur reduktis la diferencojn inter diverslokaj gren-prezoj, sed ankaŭ limigis la spekuladon de greno.

* La aŭtoro Li Zhun estas verkisto famkonata en Ĉinio pro siaj noveloj pri kampara vivo.

** Tio aludas pri “Regularo de la Kampara Popolkomunumo (provajo)” kaj “Decido pri Kelkaj Problemoj de Intensigo de Agrikultura Disvolviĝo” publikigitaj de la Centra Komitato de KPC en 1979.

*** La sistemo pri respondeco estas administra sistemo de la polkomunumo, kiu kondiĉas, ke la produktaj grupoj kaj laborantaj individuoj devas preni sur sin respondecon pri sia laborposteno, kaj postulas difinojn de homonombro, tasko, kvalito, laborpago, premio kaj puno.

Ĉou en la pekina opero

Ĉou estas speco de aktoroj en la pekina opero, ludantaj virajn rolojn kun karaktero serena kaj humura. La ĉou-oj sin dividas en *venĉou* (civilajn ĉ.) kaj *vuĉou* (batalajn ĉ.). Ili similas al arlekeno aŭ pajaco de alispecaj teatraĵoj, kaj ilia aspekto, gestado kaj humuraj kantotekstoj ofte vekas ridadon de la rigardantoj.



Sceno de pekina opero kun ĉou kiel ĉefa rolulo

Venĉou



Vuĉou



Agronomia teknikisto

He Guangdong (maldekstre) provkulturas hibridan rizon per elkulturo de rizplantidoj sur varmbedo kaj kampo.




Kulturi junajn teknikistojn por aliaj brigadoj en praktiko

He Guangdong

He Guangdong estas agronomia teknikisto de Nan-an-brigado de Peishi-komunumo de Hunan-provinco kaj membro de la Grunda kaj Sterka Instituto de Hunan-provinco.

Diplomite de elementa lernejo en 1959, li revenis al sia hejmoloko por sin okupi pri agrikulturo. Li diligente studis agronomiajn verkojn, faris esploradon pri protektado de vegetaloj, grundo kaj kulturado kaj atingis certan sukceson. Li verkis artikolojn "Batalo kontraŭ Fiinsektoj per Ruĝokula Burdo", "Kontraŭ Fiinsektoj per Insektoj" kaj "*Algedonia coclesalis*, Nove Aperinta Fiinsekto de Rizo kaj Rimedo kontraŭ Ĝi", kiuj vekis atenton de la biologiaj rondoj de Ĉinio. Lia sperto pri travintrado de *Azolla imbricata*, rilato inter meteologiaj kondiĉoj kaj kresko de rizo kaj analizo de grunde estis jam disvastigita en la loko. La mua produktokvanto de rizo en la komunumo kie laboras He Guangdong jam superis 500 kilogramojn (1 muo egalas al 1/15 hektaro).

Fotoj de
LI SHANSHAO



Analizo de grundo

Por prognozo de meteo




Mistera Lavkuvo

En la Provinca Historia Muzeo de Jiangxi konserviĝas rara historia objekto latuna lavkuvo.

La nomita lavkuvo estis elterigita en Yishan de Guangxi-provinco en 1890. La blue griza vazo kun diametro de 31 centimetroj havas randon eksteren volvatan kaj du orellformajn tenilojn. Kiam oni malpeze frotadas per la manoj la latunajn tenilojn, la akvoplena kuvo zumadas kaj samtempe kristalaj akveroj eksaltas supren de la rando de la kuvo kaj iuj el ili eĉ povas salti ĝis alteco de 2/3 metro. Kial ĝi povas zumadi kaj eljeti akverojn? Iuj opinias, ke tio estas fenomeno de resonanco; aliaj konjektas, ke la materialo de la kuvo entenas raran metalon aŭ ĝia mulda teknologio estas neordinara. Tio estas mistero ankoraŭ ne malkovrita.

La kuvo eljetas akverojn.



La latuna lavkuvo

Vestado de Beijing-anoj

de WEN TIANSHEN



Manĉura robo

REVIZITANTOJ al nia ĉef-urbo povas tuj rimarki, ke ŝanĝiĝis la vestoj de la Beijing-anoj; ili ne plu estas tiel monotaj kiel antaŭe, sed variigis.

Irante sur la movoplena komerca strato Wangfujing, vi povas vidi en la homfluo junulojn portantajn sur si modajn jaketojn aŭ han-ajn vestojn borderitajn per silkaj galonoj.

Kun la disvolviĝo de la tekstila industrio de nia lando kaj kun la pliboniĝo de la popola vivo la kvalito kaj formoj de la bluj kaj brune verdaj kostumoj fariĝis pli kaj pli akcentataj, kvankam plejparto de la funkeiuloj ŝatas porti sur si oficist-uniformon nomatan de fremduloj "Mao-a vesto". Nun multaj junaj geedzaj paroj havas nur po unu infanon kaj donas pli grandan atenton al la vestado de sia infano. Pli kaj pli multaj infanoj portas sur si jaketon aŭ freŝkoloran jupon. Kaj nemalmultaj infanaj vestoj surhavas broditajn florojn aŭ bestetojn.


En la lasta printempo furoris inter junuloj jaketoj el artefarita ledo kaj manteloj kun libera pluŝa veŝto. Iuj knabinoj aĉetis altkalkanumajn ŝuojn kaj vualojn konvenajn al iliaj vestoj. Ĉar printempe en Beijing ofte ventas, kiam ili biciklas, ili kovras sian kapon per eleganta vualo por ŝirmi sin de polvo. Kaj la altkalkanumaj ŝuoj tre harmonias kun la larĝtuba pantalono.

Samtempe kun la elvolviĝo de la palverdaj foliburĝonoj de la poploj ambaŭflanke de stratoj, vestobutikoj de Beijing vendis sume pli ol 200,000 virinajn vestojn el poliesteraj miksteksaĵoj kaj mezlongfibraj ŝtofoj. La noveco de fasonoj montriĝas per malgrandaj ornamaĵoj sur la vestoj. Ekzemple, oni brodis malgrandajn florojn sur la brusto aŭ kolumo de virina ĉemizo, aŭ borderis blankajn ĉemizojn per oraj jabotoj kaj aldonis al la vestoj orajn butonojn. La vestobutiko Blua Ĉielo ĉiutage

faras pli ol 30 kompletojn da virinaj eŭropaj vestoj. Iuj vestobutikoj liveras manĉurajn robojn, kiaj ne vendiĝis multajn jarojn en la merkato, kaj ĉiu robo kostas nur 5-8 juanojn.

"La vestado spegulas la nivelon de la kulturo kaj arto de lando aŭ nacio kaj la karakteron de ĝia popolo." Tiel opinias kamarado Wei el la vesto-industria institucio de Beijing.

La brileco de la antikva kulturo de Ĉinio speguliĝas ankaŭ en vestoj. Inter la teksaĵoj eltrovitaj en la tombejo de Mawangdui el la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 8 p.K.) troviĝas robo el gazo pli maldika ol nilona tulo. En Tang-dinastio (618-907 p. K.) oni ŝatis porti sur si longmanikan koloran jupon, funeltuban pantalonon kaj kaptukon. De Han-dinastio ĝis Tang-dinastio furoris diversaj kolumoj en formoj de H, V kaj Y. La vestoj estis tre plaĉaj kaj per la koloroj kaj per la fasonoj.



Infanaj vestoj

Jupo



La vestado de ĉinoj trapasis longtempan evoluadon. En la 30-aj jaroj de la kuranta jarcento la ĉinoj plejparte ŝatis porti sur si jakon butonitan meze aŭ oblikve antaŭ la brusto, dum la intelektuloj influitaj de la okcidenta kulturo ŝatis porti sur si longan robon aŭ eŭropan kostumon, kaj la virinoj ŝatis manĉuran robon. En la jaroj de la revoluciaj militoj, la kadroj en la revoluciaj bazlokoj portis sur si oficistan uniformon kun kvar poŝoj, kiun liveris la popola registaro. Tiu fasono estas projektita de Sun Zhongshan (Sun Jatsen), pioniro de la ĉina revolucio, kaj transformiĝis en la nunan post reformo de la poŝoj. En la militaj jaroj la progresemaj gejunuloj sentis grandan fieron portante sur si tian veston. Kaj nun ĝi ankoraŭ estas tre ŝatata de la popolo.

Post la Liberiĝo, oni ekŝatis ankaŭ aliajn fasonojn de vestoj. Sed fatalaĵo okazis en la mezo de la 60-aj jaroj, post la komenco de la kultura revolucio: ekstreme maldekstra pensfluo kondamnis la ŝaton al novaj fasonoj kiel "burĝan vivmanieron", tiel ke preskaŭ ĉiuj virinoj devis porti sur si nur blujajn vestojn, ili kuraĝis nur elmontri randojn de floraj vestoj kovrataj sub blujaj vestoj. Nur post la falo de la kvarpersona bando la popolo reakiris la liberecon sin vesti laŭplaĉe.

En la vigla komerca strato Qianmen estas vestobutiko Novo kun areo de 4,000 kvadrataj metroj. Tie oni eksponas vestojn de pli ol 3,000 specoj. La butiko vendas vestojn produktitajn de 40 vestofabrikejoj. Enirinte en la butikon, vi vidos komizojn ĝentile servantajn. Sur la var-bretaroj vi povas vidi broditajn ves-

tojn kun kvadrataj aŭ rondaj kolumoj aŭ kun kolumoj en formo de hirundo aŭ papilio. Tie troviĝas ankaŭ jakoj kun strikta talio. La nuna varieco de la vestaĵoj draste kontrastas kun la monotoneco de kostumoj antaŭ kelkaj jaroj.

En la kabineto de tiu butikoj mi intervjuis la estron Hu Jiesan, kiu ĵus revenis de Xinjiang (Hingiang). Li diris kun ĝojo: "Mi kunportis multajn centfal-dajn jupojn al Xinjiang kaj ili rapide forvendiĝis en kelkaj tagoj."

"En somero jupo estas tre konvena por virino. Kaj la jupoj donas impreson de takto." Li montris al mi du jupojn de malsamaj fasonoj: "Vidu, tiu ĉi jupo kun mallarĝaj faldoj impresas kiel kvartakta danco, dum tiu kun faldoj de malsamaj larĝecoj impresas kiel valso."

Li rakontis al mi ankaŭ interesan ĉenan reakcion de jupo: Antaŭ 5 jaroj virinoj ŝatis virajn biciklojn kaj en la biciklobutikoj stagnis granda kvanto da virinaj bicikloj. Sed en la kuranta jaro multaj virinoj ekŝatas jupon kaj ankaŭ virinaj bicikloj ĝuas debiton.

Ĉisomere nova fasono de manĉura jupa robo estas en modo. Ĝi devenis de tradicia manĉura robo. La manĉura robo estas tre taŭga al la korpo de virino kaj povas evidenti la belecon de virino, tial ĝin tre ŝatas okcidentaj virinoj. Sed en Ĉinio ĝi ne estas tre bonvena al virinoj, kiuj devas bicikli aŭ veturi per aŭtobuso. Kaj pro tio ĉijare modistoj reformis la robon en jupan robon kun aldono de zipo al la dekstra flanko, kiu povas sveltiĝi la figuron de la por-

tanto. Tiu reformo interesis multajn junajn virinojn.

La tajlorado de ĉinaj vestoj estas originala en galonado, inkrustado, kaj garnado per butonoj k.a. Ĉinio ne havas instituton de vestofarado, tamen la modistoj de Beijing faris grandan klopodon por projekti plaĉajn fasonojn. El filmoj, foiroj kaj gazetoj ĉinaj kaj alilandaj ili lernis multajn utilaĵojn por projekti fasonojn konformajn al la karakteroj de ĉinoj. La 57-jara modisto Yan Jinshan de la vestobutiko Nova Moro ĉe la strato Wangfujing tre ŝatas rigardi programerojn de la rubriko "Tra la Mondo" de la Pekina Televido, ĉar li povas vidi en ĝi modajn vestojn de aliaj landoj. En la lasta printempo majstro Yan kaj liaj kolegoj projektis sume 25 fasonojn de printempaj kaj someraj vestoj. Majstro Yan estas tre lerta en tajlorado de kostumoj kaj jupaj roboj el krudita kaj striita ŝtofoj. En iu fasono de virina jaketo li kreive aplikis plisadon.

Nun la ĉina fako de vestofarado, kiu aliĝis al la Internacia Asocio por Vesta Normo, faris esploran mezuradon al 400,000 homoj en diversaj aĝoj, kaj surbaze de tio difinis unuecajn normajn mezurojn, por science kontroli la produktadon de pretaj vestoj.

En la nova Ĉinio la socialismaj laboro kaj produktado kondukas al plenamplaksa disvolviĝo fizika kaj mensa, kulturata ĉe la homoj sanan estetikan vidpunkton kaj intensigas ilian deziron beligi la vivon. La pli kaj pli riĉiĝanta vestado de la Beijing-anoj prezentas faceton de tio.



* Branka Tepsic, 19-j., Rade Končara 86, 43000 Bjelovar, Jugoslavio, dez. kor. kun ĉinaj gejunuloj pri muziko, sporto, naturo, pm. k. insignoj.

* Silvana Di Giovanni, instruistino, Via Nazario Sauro, 14, 64022, Giulianova Lido (TE), Italio, dez. kor. kun ĉinaj lernantoj.

* Dolega Kazimierz, 19-300 Elk, ul. Slowackiego 14/36 Pollando, dez. kor. kun ĉina esp-isto.

* S-ro Antonin Bombionka, Sokolovska 1178, 708 00 Ostrava-Poruba IV, Ĉeĥoslovakio, kun ĉina esp-isto pri interŝ. de bk. k. pri lingvo, muziko, teatro, literaturo, historio ktp.

* Ahmad Samii, Irano, Teherano, Gorgano Strato, Ĉarahe, Azjimuro 150, dez. kor. kun juna islama esp-ist(in)o.

* Hans Flassbeck, Postfach 1542, D-5300 Bonn 1, FR Germanio, dez. pensinterŝanĝon al vivosaĝeco k. socialaj problemoj.

* Raili Marttinen, 48-jara ŝtatoficistino, Valtatie 77 A 7, 90500 Oulu 50, Finnlando, dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj pri literaturo, pentrarto, mondpolitiko ktp.

* Donad Law, Ruskin, Ashurs T Drive, Box Hill, Tadworth, Surrey, Anglujo, dez. kor. kun multaj homoj tra la tuta mondo.

* Sugawara Atsuhiko, 22-j., Otamaya-ryo, Otamayashita 12-1, Sendai, Miyagi, 980 Japanio, kun ĉina s-ano pri lingvo, historio k. ĉio.

* Simoga Csaba, 27-j., Satoraljaujhely, Dorzsik utca 2, H-3980, Hungario, dez. kor. kun ĉina esp-isto.

* Josef Eder, Eggenberger Gurtel 32/2, A-8020 Graz-Aŭstrio, dez. kor. kun ĉina esp-isto pri kristanismo.

* Jiri Šilc, 20-jara lernanto de agrikultura mezlernejo, Jankovice 166, 687 04 Traplice, Okr. Uh. Hradiste, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. kun ĉina esp-isto pri diversaj temoj pri protekto de naturo, literaturo, muziko belecoj kaj interŝ. bk.

* Vasile Albu, Str. Eroilor Nr. 9. 2400 Sibiu, Rumanio, dez. kor. kun ĉinaj esp-istoj.

* F. R. Griffin, 5 Kirkstone Gardens, Newcastle Upon Tyne, Ne7 7an, Anglio, dez. kor. per mallongaj leteroj kun esp-isto aŭ esperanta klubo pri kia ajn temo.

* Buczkowski Waldemaro, 18-j., P1-08-44-Pilawa, str. Aleja Wyzwolenia 234, Pollando, dez. kor. kun juna ĉina esp-ist(in)o.

* Silvia Pilger, 7-jara lernanto, Leekerhoek 26, Lelystad, Nederlando, dez. kor. kun infanoj de 6 ĝis 9 jaroj en Esperanto en Ĉinio.

* Stanistaw Klim, 28-jara teknikisto, 57-200 Zabkowice Sl., ul. Kusociuskiego 11/1, Pollando, dez. kor. kun esp-istoj el Ĉinio k. el aliaj landoj de Azio pri pentrado, arto k. kulturo de la tuta mondo.

* Anna Miarka, 18-jara lernantino de ekonomia mezlernejo, 77-212 Sepolno Wielkie, Pollando, dez. kor. pri junularaj problemoj.

* Dovg Catterall 38-jara komizo, 9 Linkway, Pinner, Middx HA5 4Tr, Britio, dez. kor. kaj interŝ. poŝmarkojn.

* Ursula Axewczyle, 16-jara lernantino, ul. Targova 5, 08400 Garvolin, Pollando, dez. kor. kun diversl. gejunuloj pri diversaj temoj.

* Waldemar Gasior, 40-jara teknikisto en Instituto de Aŭtomatiko ul. Cybulskiego 26/13, 50-205 Wroctaw, Pollando, volas interŝ. bk., pm., E-librojn kaj interŝ. pri literaturo, kino, muziko.

* Frederick R. Gould, 84-jara nova Esp-isto, 115 High Street, Shirehampton, Bristol, BS11 ODE, Anglio, dez. kor. kun ĉino pri lando, popolo kaj kulturo.



Lerta

(Popolrakonto)

Ilustrita de
WEI ZAIYUN

ANTAU tre tre longe, vivis en Lifoqiao (Lifoĉjaŭ) de Hangzhou (Hangĝou) saĝa kaj diligenta knabineto nomata Lerta. Kiam ŝi estis naŭjara, ŝia patrino mortis postlasante ŝin kaj ŝian fraton kvarjaran. Ne povante mem prizorgi ilin, ilia patro prenis al si alian virinon. Tamen la duonpatrino havis koron de skorpio kaj ofte insultis kaj batis senkomplete la infanojn.

Iutage en tranĉa vintro, ŝi ordonis, ke Lerta kolektu verdajn herbojn. Kiel oni povus trovi tion en frosta vintro! De la mateno ĝis la vespero kaj de riverbordo ĝis monttalo ŝi migris kaj migris, sed nenie trovis tian herbon. Pro malvarmo kaj timo ŝi ekploris maldolĉe sidante

ĉe la monttalo. Subite aŭdiĝis voĉo de supre:

“Por junaj herboj al la valo!
Por junaj herboj al la valo!”

Lerta levis sian kapon kaj vidis birdon kun blanka kapo, kiu ekflugis al la montvalo. Ŝi tuj stariĝis, forviŝis la larmojn kaj ekkuris ĝin sekvante. Ĝi turnis sin al alia direkto kaj malaperis. Ŝi vidis ĉe la buŝo de la valo maljunan pinon similan al verda ombrelego, kiu kaŝis la enirejon. Lerta depuŝis branĉojn, preterpasis la pinon kaj subite eksentis lumon kaj vidis antaŭ si zigzagan rivereton murmurantan. Ĉe ĝiaj bordoj ruĝis floroj kaj verdis herboj kvazaŭ en bela ĝardeno printempa.

Trovinte la herbojn, ŝi ekĝojegis kvazaŭ ŝi trovis trezoron. Ŝi tuj kaŭriĝis kaj komencis falĉi. Kolektante herbojn ŝi iris pli kaj pli malproksimen kaj venis al la fino de la rivereto.

Kiam ŝi jam plenigis sian korbon per herboj kaj stariĝis por forviŝi la ŝvitgutojn de sur sia frunto, ŝi rimarkis, ke nemalproksime antaŭ ŝi virino en blanka bluzo kaj blanka jupo mansalutas ŝin, tenante korbon per la alia mano. Kun rideto ŝi diris al Lerta:

“Knabineto, malofta gasto, venu resti ĉe ni por kelkaj tagoj!”

Lerta levis la rigardon kaj vidis alian mondon antaŭ si: Ĉe la monttalo troviĝas vico da domoj kun

blankaj muroj kaj tegoloj; antaŭ ili kreskas arbetaro kun verdaj folioj pli grandaj ol manplatoj; kaj multe da virinoj en blankaj vestoj kun korbo en unu mano kolektas junajn foliojn en la arbetaro ridante kaj kantante.

Al Lerta tre plaĉis tia vivo kaj ŝi restis tie kun ili.

Ekde tiam ŝi kunvivis kun la onkloj en blankaj vestoj. Tage ili kolektis junajn foliojn en la arbetaro kaj nokte nutris neĝblankajn raŭpojn per ili. La mirindaj raŭpoj plenkreskiĝis iom post iom. Ili eligis silkojn kaj formis per ili blankajn ternuksojn. La onkloj instruis ŝin kiel eltiri el ili brilajn silkojn kaj kiel kolorigi ilin per arbosemoj: safirigi silkojn per bluaj semoj, rubenigi silkojn per ruĝaj semoj kaj origi silkojn per flavaj semoj... Kaj ili diris al ŝi, ke la diverskoloraj silkoj servas por fari robon kun drakodesegno por la Ĉiela Imperiestro kaj por ke la Teksanta Knabino faru el ili brokaton kun nubodesegnoj.

En la valo Lerta ĝoje kolektis morus-foliojn, nutris raŭpojn kaj bobenigis silkojn kune kun la on-

kloj. Flugadis la tempo kaj baldaŭ jam forpasis tri monatoj.

Iutage, venis al ŝi en la kapon la ideo, ke ankaŭ ŝia frato venu tien por vivi feliĉe. Apenaŭ elkrepuskiĝis en la sekvanta tago, ŝi jam ekiris al sia hejmo, sen adiaŭo al la onkloj.

Antaŭ la ekiro, ŝi prenis blankan paperpecon plene kovritan de ovoĵoj de la mirinda raŭpo kaj plenigis siajn poŝojn per morusaj semoj. Survoje ŝi iris ŝutante la semojn kaj pensante: Morgaŭ mi revenos laŭ la vojo markita per la morusaj semoj.

Hejmenreveninte ŝi trovis, ke ŝia patro jam maljuniĝis kaj ŝia frato fariĝis junulo. Kiam la patro vidis ŝin, li demandis kun ĝojo kaj ĉagreno:

“Lenjo, kial vi forestadis dum 15 jaroj? Kie vi estis dum tiu tempo?”

Lerta surpriziĝis kaj rakontis la travivaĵon al sia patro. Informiĝinte pri tio, la najbaroj venis por vidi ŝin kaj diris, ke ŝi rekontiĝis kun feinoj.

Frumatene de la sekvanta tago ŝi volis reiri al la montvalo. Apenaŭ

ŝi trapasis la sojlon de la pordo ŝi rimarkis, ke kreskas vico de verdaj arboj laŭlonge de la vojo—la semoj ŝutitaj de ŝi jam fariĝis arboj. Laŭ la arbovico ŝi iris al la valo. La maljuna pino ĉe la enirejo restis kiel giganta ombrelo. Tamen ŝi ne povis trovi la vojon post ĝi.

Kiam Lerta estis gapanta al la pino, ŝi subite vidis, ke la birdo kun blanka kapo elflugas de malantaŭ ĝi, pepante:

“Lerta ŝtelis trezoron! Lerta ŝtelis trezoron!”

Tiam ŝi ekkomprenis, ke la blank-vestaj onkloj koleriĝis kaj kaŝis la vojon, pro tio ke ŝi prenis ovoĵojn de la mirinda raŭpo kaj morusajn semojn sen sciigo al ili. Ŝi revenis en sian hejmon, elovigis mirindajn raŭpojn per kovado kaj komencis bredi ilin per morus-folioj.

Ekde tiam vivas mirindaj raŭpoj ankaŭ en la homa mondo, kaj la homoj ilin nomas silkraŭpoj.

Bredado de silkraŭpoj komenciĝis ĉe Lifoqiao de Hangzhou. Post nelonge ĉiuj familioj de multaj vilaĝoj en ĝia najbareco okupiĝis per tio kaj tiu regiono famiĝis pro sia produktado de silko.



La ĉina humura dialogo

ANKAŬ la ĉinoj tre ŝatas humuron. En ilia vivo abundas floroj de humuro-arto kaj la humura dialogo estas unu el ili.



La formo de humura dialogo kreiĝis en la popolamasoj. Ĝi ofte vekas ridojn per spritaĵoj, tial ĝi estas ŝatata de plejparto de la ĉinoj.

Humura dialogo estas ludata ordinaro de du viroj starantaj unu apud la alia. Unu el ili, kiel la ĉefrolulo, parolas pli multe, dum la alia kondukas la dialogon per malmultaj vortoj de unu al alia tikla punkto. Krom sprite babilo ili ankaŭ kantas, imitadas kaj faras komikajn gestojn. Hou Baolin, Beijing-a majstro de humura dialogo, tre lertas je imitado de diversaj sonoj kaj gestoj kaj kantado. Li kapablas imiti diversajn parolojn. Li scipovas paroli multajn dialektojn kaj kanti pecojn el diversaj ĉinaj operoj. Li diris, ke se oni imitas kantadon, oni devas bone tion fari por ĝuigi la spektantojn. Lia disĉiplo Ma Ji gajnis vastan spektantaron per lertaj babiloj kaj spritaĵoj kaj li povas ridigi la spektantojn per sia originala parolmaniero. Li diris, ke humura dialogo estas lingvoarto,

tamen oni devas ne kontentiĝi nur je sukcesa veko de ridegoj ĉe la spektantaro, sed profunde pensigi ĝin pri io signifoplena per spritaĵoj.

Al humura dialogo ironio estas nemalhavebla. Eĉ en laŭdaj humuraj dialogoj tio ne mankas. En la lastaj jaroj, la ĉinaj literaturo kaj arto prezentas sanan tendencon fronti al la realo kaj interveni al la popola vivo. Kaj la artistoj de humura dialogo iras avangarde en tio. Per siaj novaj verkoj ili kuraĝe elmontras aktualajn sociajn problemojn. Ekz-e, iu humura dialogo kritikas, ke iuj antaŭaj filmoj

prezentas formule "heroojn", kiuj, anstataŭ tuj morti kiel ordinaraj homoj post kiam ili estis trapafitaj je la brusto, faras longan politikan predikon. Alia humura dialogo titolita "Aĉeto de Simioj" kritikas neglektemulojn. Ricevinte la taskon aĉeti 50 kestojn da kosmetikajoj kun Simio-marko, iu magazena oficisto aĉetis 50 kestojn da simioj pro miskompreno. La simioj elkaĝiĝis kaj kuris supren kaj malsupren en la domo de la magazeno, kaŭzante multajn malagrablajojn. La sperto de tiu oficisto instruas, ke oni devas esti atentema en ĉiu laboro.



*Mienoj de Ma Ji
en humura dialogo*

Ma Ji (la maldekstra) en humura dialogo



La "Notoj de la Historiisto" asertas ke la ĉina humura dialogo ekaperis antaŭ 2,000 jaroj. Tamen ĝi vere fariĝis aparta artoformo sisteme lernebla nur en la lastaj 100 jaroj. Ĝia unua aktoro nomiĝis Zhu Shaowen, arlekeno de iu Pekin-opera trupo en la 19-a jarcento. Tiam, ofte mortis altranguloj en la imperiestra palaco, sekve okazadis ŝtata funebrado centtaga, dum kiu la ŝtato malpermesis amuzajn aktivadojn kaj muzikon en la teatroj. Por sin vivteni, la aktoroj devis kantadi surstrate. Zhu Shaowen prezentis do humurajojn. Poste, li akceptis disĉiplon, kiu prezentis kune kun li humurajn dialogojn, kaj tiel naskiĝis tiu arto.

La tiamaj humurdialogistoj egalas preskaŭ almozulojn. Per sia prezentado ili petakiris monerojn de rigardantoj por sin vivteni. Poste, la humura dialogo enlistigis al programo de kant-rakontaj amuzejoj kaj teatrinkejoj kaj poste estis disvastigita al najbaraj urboj de Beijing. Post evoluado dum pli ol

100 jaroj, nun ĝi jam populariĝis en la tuta lando, ascendis la scenejojn, eniris radiodisaŭdigon kaj televidon kaj fariĝis originala arta formo ŝatata de la amasoj. La 63-jara Hou Baolin estas humurdialogisto de la 6-a generacio kaj Ma Ji de la 7-a. Ili grave reformis la enhavon de humura dialogo kaj eliminis vulgarajn histrionajojn. De la 50-aj jaroj de la 20-a jarcento, ekaperis humuraj dialogoj por laŭdo, kiel ekzemple, "Procelario" verkita de Ma Ji laŭdas junan fiŝistinon, kiu brave gvidas grupon de fiŝistinoj en laboro sur maro kaj per sia praktikado rompis la superstiĉon, ke partopreno de virinoj al surmara fiŝkaptado povas kaŭzi "katasstrofon". Lastatempe, Ma Ji kreis novan humuran dialogon por laŭdi per ĉinaj antikvaj poemoj la naturajn belajojn de la patrolando.

La ĉina humura dialogo interesis ankaŭ fremdlandanojn kaj iuj homoj en Britio, Svedio, Usono, Kanado kaj Aŭstralio studas ĝin. Post sia vizito al

Ĉinio, Perry Link, profesoro de la Kalifornia Universitato, verkis artikolon pri la humura dialogo de Ĉinio. Li skribis, ke ĝi estas populara komedia arto. Li diris: "La akorda kunagado de du aktoroj en prezentado dum ĉ. 15 minutoj regalis la okulojn kaj orelojn de la spektantoj per delikata bongustajo. Iliaj spritajoj ilin ridigis, ilia kantado ilin silentigis, ilia lerta imitado de sonoj kaj gestoj ilin ravis, kaj iliaj akraj ironioj ilin ĝojigis."

Nun, la arto de humura dialogo plue disvolviĝas. La spertuloj de tiu arto ofte interkonsiliĝas kaj interŝanĝas opiniojn pri novaj problemoj. Hou Baolin, vicprezidanto de la Tutlanda Ĉjujiista* Asocio, nun plene sin dediĉas al verkado por transdoni sian 50-jaran sperton al la novaj humurdialogistoj.

* Ĉjuji-o: ĉina popola arto de kantado kaj rakontado, kiu ampleksas la humuran dialogon, kontra-kontadon kun klakilo, tambureto aŭ kordinstrumentoj en akompano, dupersonan opereton k.s.

B O N E

(Humura dialogo)

- A Malsamaj estas la homaj interrilatoj en la nova kaj malnova socioj.
- B Komprenoble.
- A Antaŭe estis tiaj homoj, kiuj ĉiam bone-adis por flati tiun, kun kiu li interparolis.
- B Donu ekzemplon per imito.
- A (Imitante) "Ho, longe mi ne vidis vin, vi multe grasiĝis!"
- B Jes.
- A "Bone! Jen kiel sane brilas via vizaĝo! Certe vin favoros la Fortuno. Nu, kiel vi nomiĝas?" Flatadi eĉ sen scii la nomon.
- B Mia familia nomo estas Li.
- A "Bone! En la «Libro de Familiaj Nomoj» la via staras en la unua linio. Ĉu vi ankoraŭ loĝas en tiu loko?"
- B Jes.
- A "Bone! Tre bela loko, movplena kaj kvieta."
- B Oho!
- A "Tage movplena kaj nokte kvieta. Kie vi naskiĝis?"
- B En Beijing.
- A "Bone! Beijing, bonega urbo, kultura centro, antikva, pitoreska, tre bone."
- B Bone? Sed mi translokiĝis.
- A "Kien?"
- B Al Tianjin.
- A "Bone! Centro de tera kaj akva trafiko en la malsupra baseno de naŭ riveroj, kun tri flos-pontoj kaj du doganejoj. Ĝi havas tri famajn konstruaĵojn: Tambura Turo, Bateriaĵo kaj Tintila Turo. Loĝadu tie. Bone."
- B Bone? Mi denove translokiĝis.
- A "Kien do?"
- B Al Shenyang en la Nordoriento.
- A "Bone! En la Nordoriento produktiĝas tri trezoroj: ginsengo, zibela felo kaj lanoherbo (*Eriophorum scabridum*). Nutrado per ginsengo povas longigi la vivon. Bone!"
- B Kaj mi translokiĝis poste al Baoding.
- A "Bone! Tiu urbo estas la pordo de la Ĉefurbo, kaj ankaŭ ĝi havas siajn tri trezorajn produktaĵojn, nome: fer-globo, sojsaŭco kaj neĝbrasiko (*Brassica juncea*). Homo kun plena libertempo, kiel vi, povas sin distri per glutado de fer-globoj. Kiel bone!"
- B Ho! Kial gluti fer-globojn!
- A "Por solidigi la sanon per tia gimnastiko, bone do."
- B Kaj mi translokiĝis denove al Beijing.
- A "Bone! Popolo diras: Amata estas la hejmm-tero, al maro fluas la riveroj. Vi ankoraŭ ne atingis la aĝon de dek mil jaroj?"
- B Kion vi diras? Mi vivis nur naŭ mil jarojn.
- A "Bone! Bone!"
- B Kion vi diras? Nur 38 jarojn.
- A "Bela aĝo. Ĉu vi edziĝis?"
- B Jam antaŭ longe.
- A "Bone! Frue formi familion, frue fondi pozicion. Kiom da infanoj vi havas?"
- B Kvin filojn.
- A "Bone! Bela sorto por vi, kvin obeemaj filoj en servo al vi, feliĉa sinjoro! Bone!"
- B Malfeliĉe! Mortis kvar el ili!
- A "Bone, unu bona filo valoras je dek. Tro multe da filoj ofte kaŭzus al vi malagrablaĵojn. Kiel bone, vin servas filo sola!"
- B Ne, li ŝteladas.
- A "Bone! Prefere havi ŝtelisto-filon ol idioto-filon. Li povas ŝteli por vi kion vi bezonas. Kiel bone!"
- B Sed li jam komencis rabi!
- A "Bone! Ŝteloj ne multe helpas, sed unufoja rabo jam povas vin riĉigi. Bone."
- B Li estas arestita de la polico.
- A "Do vi ne plu bezonas zorgi pri li."
- B Li estos mortpafita!
- A "Bone! Vi ne bezonas vin ĝeni pro li."

(Kompilita de GUO QUANBAO)

La bela Suda Ĉina Maro

Fotoj de ZHANG WEI




Rigardi tajdon ĉe
la Terkapo



Vesperruĝo

Sunleviĝo ►







En la Kokosarba Brigado



Hainan-insulo

de CHAI ZHONGWEN

LA bela kaj fekunda Hainan-insulo kun areo de 32,200 kvadrataj kilometroj estas la dua granda insulo de Ĉinio post Taiwan. Tiu insulo situanta en tropika zono estas favorata de printempo dum la tuta jaro. Sur ĝi ĉie kreskas kokosarboj, larĝfoliaj bananarboj, pompe floran-taj kapokarboj kaj diversaspecaj verdajoj. Per siaj ĉarmaj pejzaĝoj ĝi allogas al si multajn turistojn.

WANQUAN-RIVERO

Por la vizitantoj al la insulo, estas plezuro iri al Wanquan-rivero por ĝui ĝiajn belajn pejzaĝojn. La rivero sin trovas en la orienta parto de la insulo. Ĝi longas 162 kilometrojn kaj estas la tria granda rivero de la insulo. Ĝiaj du supraj branĉoj kunfluas en la gubernio Qionghai kaj enfluas en la Sudan Ĉinan Maron. En la periodo de la Dua Enlanda Revolucia Milito de la tridekaj jaroj tie aperis fama "Ruĝa Virina Kompanio", tial ĝi fariĝis por ĉinoj pli konata ol la aliaj riveroj sur la insulo.

La suda branĉo de Wanquan-rivero elfluas el la orienta flanko de Wuzhi-montaro, kaj en

tiu parto multas krutaj fluejoj. La torento faris, en iu loko, multajn truojn en rokoj kaj kreis multajn stalagmitojn. Tiu strangaj rokoj videbliĝas en akvomalabunda sezono. En sia malsupra baseno la rivero fluas kviete, kaj ĝia akvo estas kristale klara. Ambaŭborde de la rivero kreskas kokosarboj, post kiuj kuŝas verdaj kampoj. La bordaj pejzaĝoj estas tre ĉarmaj ĉu en nebula mateno de printempo aŭ en somera vespero. Kun la disvolviĝo de la turisma servo de nia lando, koncerna fako instalos al la rivero plezurboatojn, tiel ke turistoj povos tie remadi, fiŝokadi kaj naĝadi.

"LERNEJO TRASERĈITA"

La nomita lernejo situanta en la urbeto Fucheng de Qionghai-gubernio estas unu el la antikvaj konstruaĵoj de Hainan-insulo kaj nun Hainan-a Normala Lernejo.

Laŭ historia noto la lernejo konstruiĝis en la jaro 1710. Ĝia unua instruisto Xie Bao estis talentulo lerta en edukado. En la pasintaj pli ol 200 jaroj ĝi estis la plej alta lernejo de Hainan kaj elkulturis multajn kapablulojn.

La lernejo estis plurfoje pli grandigita kaj riparita. Ĝia pavilono Kuixing konstruita en la jaro 1753 nun staras ankoraŭ sendifekte. Ĝiaj kvadrataj koloj estas faritaj el bluaj ŝtonoj kaj la trabaro estas ruĝe lakita kaj surhavas gravuraĵojn. La plurtavolaj tegmentoj de la pavilono estis tegitaj per malhele verdaj glazuritaj tegoloj. En ĝia centra halo staras granda tablo, ambaŭflanke de kiu metiĝas du vicoj da antikvecaj seĝoj. Oni diris, ke Xie Bao siatempe instruis tie. En la korto staras granda ŝtonplato, sur kiu engravuriĝis vortoj apenaŭ legeblaj pri la dato de la finkonstruo de la lernejo. Tie zefiro blovetas, floroj pompas en vazoj, altaj pinoj kaj cipresoj ŝirmas aleojn. Ĝi ja estas bona loko por lernado.

La Lernejo Traserĉita antaŭe nomiĝis lernejo Qiongtai. En la komenco de la 18-a jarcento, juna sklavino de la urbetestro Cuilian fuĝis en la lernejon Qiongtai, ne povante toleri feŭdisman katenon kaj persekutadon, kaj kaŝiĝis ĉe studento Zhang Riwen. Rezulte de tio ili enamiĝis unu al la alia. La urbetestro sendis soldatojn tra-

serĉi la lernejon kaj postulis, ke Xie Bao donu la fuĝinton. Xie estis justama kaj tre simpatia al la lernantoj. Li helpis ilin artifice eskapi el la traserĉado, kaj ebligis al la geamantoj geedziĝi. Tiu rakonto cirkulis tre vaste, kaj pro tio la lernejo ricevis nunan nomon. Tiu rakonto poste estis adaptita al teatraĵo surscenigita en Guangdong-opero sub la titolo "Traserĉado de Lernejo" kiu fariĝis unu el la plej ŝatataj operoj. La rakonto allogis al la lernejo multajn turistojn kaj eĉ transmarajn ĉinojn.

REZERVEJO DE MAKAKOJ

En la montaj arbustoj de Nanwan-duoninsulo de Lingshui-gubernio vivas multaj makakoj. En 1965 la ŝtato tie starigis rezervejon de sovaĝaj animaloj. En la pasintaj 15 jaroj la



Rezervejo de makakoj

makakoj rapide multiĝis ĝis preskaŭ mil. Tiu rezervejo estas la sola loko de Ĉinio por breddisimiojn.

Makako estas unu el la raraj bestoj de Ĉinio. Ili surportas grizbrunan hararon, estas lertmovaj kaj tre amindaj. Ili kutimas vivi arope, ĉiu aro de makakoj havas sian ĉefon, al kiu ĉiuj grupanoj obeas. La makakoj estas batalemaj. Kiam du aroj da makakoj renkontiĝas, ili ekbatalas. La venko aŭ malvenko ne estas decidita de la nombro de makakoj, sed de la saĝeco de la makakaj ĉefoj. Post la batalo la venkintoj okupas la lokon, kaj la venkitoj forkuras.

Wanquan-rivero



Post plurjara bredado, la makakoj nun jam povas esti alvokitaj de homo. Kiam bredisto fajfas, krioj de makakoj tuj aŭdiĝas inter arboj. Baldaŭ aroj da makakoj saltas de branĉo al branĉo kaj kolektiĝas rapide.

La laboristoj de la rezervejo kulturas rizon, bataton kaj arakidon por nutri makakojn. Krome, ili kulturas ankaŭ arbojn de kokoso, mango, ananaso, liĉio

kaj aliaj tropikaj fruktoj. En baldaŭa estonteco tiu loko fariĝos originala turisma loko kun multaj makakoj kaj diversaj fruktarboj.

“TERKAPO KAJ ĈIELA FINO”

En Yaxian-gubernio, la plej suda parto de Hainan-insulo, troviĝas vidinda loko nomata “Terkapo kaj Ĉiela Fino”. Sur ĝia parto etendiĝanta en la maron staras multaj nigraj ŝtonkolonoj en diversaj pozoj. Sur grandaj rokoj gravuriĝis grandaj ideografiaj “Terkapo”, “Ĉiela Fino” kaj “Kolono sur la Suda Landc”

Starante sur la loko oni povas vidi, ke sur la vasta maro punktiĝas velŝipoj, kaj la marakvo verda kiel smeraldo en proksimo

kaj blua kiel safiro en malproksimo trembrilas en sunlumo. La bela pejzaĝo de la suda maro inspiris multajn poetojn. Prin-tempe de 1961, la forpasinta fame konata poeto Guo Moruo verkis tie tri poemojn, el kiuj unu legiĝas jene:

*La kabo ja ne estas tera fino;
kaj la ĉiel' etendas sin sen
rando.*


*La golf' kun bluaj ondoj vere
vastas,
rulŝtonoj kuŝas sur la blanka
strando.*

*Kun la amasoj pene ni laboros
por superregi grandan la na-
turon.*

*En sudo ĉielskrapas kolone-
go —
ni kune trapenetru la futuron.*

Ĝuste kiel la poeto diris, la loko ne estas terkapo nek ĉiela fino. Kial oni nomas ĝin “Terkapo kaj Ĉiela Fino”? Ĉar Yaxian situas tre malproksime de centra Ĉinio kaj en la antikva Ĉinio kun tre malfacila trafiko feŭdismaj dinastioj prenis ĝin kiel lokon por teni ekzilitojn. Kompreneble, tio jam estis historia fenomeno, hodiaŭ Hainan-insulo havas tre oportunan trafikon kun la kontinento, civila aviadilo periode flugas de Guangzhou (Kantono), la ĉefurbo de Guangdong-provinco, al Haikou, la politika centro de la insulo. Multaj ŝoseoj kunligas ĉiujn urbojn kaj urbetojn de la insulo. La “Terkapo” kaj “Ĉiela Fino” kaj la proksimaj Yacheng-termofonto kaj la pitoreskejo Luhuitou estas frekventataj de multaj turistoj dum la tuta jaro.

Terkapo kaj Ĉiela Fino





Ba Jin

Pri romano de Ba Jin

Ba Jin (Bakin) komencis lerni kaj uzi Esperanton frue en la dudekaj jaroj. Poste li forlasis ĝin pro diversaj kaŭzoj, tamen li ĉiam havas profundan amon por la lingvo. Informiĝinte, ke la Redakcio de El Popola Ĉinio eldonos lian mallongan romanon "Aŭtuno en la Printempo" esperantigitan, li kun plezuro skribis por ĝi jenan antaŭparolon.

Okaze de eldono kaj distribuo de la libro ni publikigas ĉisube lian noton pri la verkado de la libro.

— **La Red.**

ANTAŬPAROLO

Por la Esperanta Eldono

"Aŭtuno en la Printempo" estas romano verkita de mi antaŭ pli ol 40 jaroj. En ĝi ankoraŭ postrestas mia junea entuziasmo. Mi rakontis en ĝi malĝojan historion de iu

amiko kaj iu knabino floraĝa, mi apelaciis por la juna generacio citante la faman diron de E. Zola: "J'accuse!" (Mi akuzas!) Tiu amiko poste fariĝis verkisto kun renomo, sed li trafis tragikan morton sub persekutado dum la tiranado de la kvarpersona bando. Pri tio mi skri-

bis en artikolo publikigita en 1978, kiun mi aldonas apendice al tiu ĉi libro por memori mian bedaŭrindan amikon.

En 1972, kiam mi ankoraŭ estis suferanta de la dekjara persekutado, eldoniĝis svedlingva tradukaĵo de tiu ĉi romano. Pasintjare, aperis

ĝiaj angla kaj franca versioj en la Pekina gazeto "Ĉina Literaturo". Nun informiĝinte ke baldaŭ presiĝos ĝia Esperanta tradukajo, mi sentas aparte grandan ĝojon. Tiu ĉi estas la unua esperantigitaĵo el miaj verkoj. En la dudekaj kaj tri-dekaj jaroj, mi tradukis literaturaĵojn el Esperantaj originaloj aŭ pere de Esperanto. "Printempo en la Aŭtuno" de J. Baghy estis unu el ili. La ideo titoli mian mallongan romanon verkitan en 1932 per "Aŭtuno en la Printempo" venis en mian kapon ĝuste post fintraduko de la romano de J. Baghy. Mi eĉ verkis por ĝi antaŭparolon imitante lian tonon. Tio montras la influon de lia verko al mi en tiu periodo. Mi dankas lin, kaj mi dankas Esperanton.

Mi amas Esperanton. Mi komencis ĝin lerni kiam mi estis 18-jara, kaj mi plej multe interesiĝis pri ĝi en la dudekaj jaroj. Poste mi forlasis la E-movadon por preskaŭ 50 jaroj pro diversaj kaŭzoj, tamen mi skribas tiujn ĉi vortojn por la Esperanta versio, mi ankoraŭ sentas grandan sorĉon de Esperanto al mi. Foje mi diris, ke mi dediĉos miajn lastajn jarojn por la afero de amikeco inter la popoloj, ja tiu afero inkluzivas ankaŭ la E-movadon.

Ba Jin

La 24-an de marto, 1980

PRI "AŬTUNO EN LA PRINTEMPO"

Lastan semajnon mi intervidiĝis kun du amikoj el sveda kultura rondo, ili donacis al mi svedlingvan libreton. Mi trovis, ke ĝi estas versio de mia mallonga romano "Aŭtuno en la Printempo". Tion mi ja ne atendis. Tiu libro eldoniĝis en 1972, kiam mi estis "flankenigita" kaj senigita je la civitanaj rajtoj, ĉefe pro tio ke mi skribis dek kvar "fisorĉajn librojn" de "vasta venena influo", inter kiuj troviĝis tiu ĉi "Aŭtuno en la Printempo".

Reveninte hejmen kun tiu donacajo, mi elprenis mian originalon kaj ĝin foliumis ĝis malfrua nokto. La temperaturo en mia ĉambro estis 33° C. Mi aŭdadis bruon de preterpasantaj trajnoj en malproksimo. Estis bruoplena kaj varmega nokto. Mi ne emis dormi. Mi foliumis, legis . . . kaj rememoris pasintaĵojn antaŭ 46 jaroj.

Estis printempo de 1932. Mi forlasis mian loĝejon en Baoshanstrato en Shanghai post kiam japana armeo invadis Zhabei je la 28-a de januaro, kaj poste mi veturis al Jinjiang de Fujian-provinco por vidi amikojn. Mi loĝis tie malpli ol du semajnojn. En tiu antikva urbo de suda Ĉinio mi havis multajn amikojn, el kiuj iuj estis lokanoj kaj aliaj almigrintoj el Shanghai. Ili laboris kiel instruistoj en du lernejoj. Unu el ili nomiĝis Supera Mezlernejo Tagiĝo, la alia estis popola mezlernejo. Ankaŭ Shen, la mastro de Jinjiang-librejo, estis mia amiko. Li ofte vizitis min por informi min pri okazaĵoj en la kultura sfero en tiu loko. Plurfoje li menciis la nomon de iu malsana knabino kaj koncize rakontis al mi ŝian historion. Li volis, ke mi vizitu tiun mian junan leganton, kaj mi konsentis.

En postpluva serena tago, Shen kaj iu alia amiko, kiu estis instruisto, iris kun mi tra kotaj padoj inter kampoj por viziti la nekonsantan knabinon. En malhela ĉambro de riĉula biendomo mi vidis la knabinon kun plaĉa vizaĝo. Ŝi kuŝis sur vasta lito kun framo por moskitovualo, kovrita per maldike vatita litkovrilo, kaj sidiĝis tuj je nia eniro. Ni sidiĝis sur longa senapogila benko kaj Shen diris al ŝi kial ni ŝin vizitas.

La knabino nur ridetis silente. Mi diris kelkajn kuraĝigajn vortojn al ŝi, kaj Shen faris klarigojn pri ili. Ŝi rigardis al mi kvazaŭ deziranta diri ion, sed ŝi nur diris dufoje "dankojn". Ni restis ĉe ŝi duonan horon kaj interŝanĝis apenaŭ dek

frazojn. Kiam ni diris ĝisrevidon, ŝi ankoraŭ ridetadis mute. Sed mi rimarkis, ke larmoj ruliĝis el ŝiaj okuloj.

Mi jam forgesis, kiel ŝi nomiĝis. Ŝi estis nur ĉirkaŭ dudekjara kaj forlasis nian mondon post unu aŭ du jaroj. Ŝi neniam resaniĝis. La kaŭzo de ŝia freneziĝo estis, ke ŝia patro insistis ke ŝi edziniĝu al viro, kiun ŝi ne amis, kaj malpermesis al ŝi daŭrigi sian studon en lernejo.

La historio de tiu freneziĝinta knabino turmentadis mian koron. Mi estis tro multe informita pri tiaj kazoj! Mallibera geedziĝo, katenado de tradiciaj konceptoj, despotismo en familio, unuvorte, la malracia socisistemo ruinigis milojn kaj milojn da junaj koroj. Mi diris al mi, ke mi apelacios por ili.

Reveninte al Shanghai, mi verkis mallongan romanon en unu spiro. Mia koro faciliĝis nur post kiam mi demetis la plumon lastfoje kaj faris longan elspiron. Mi sentis ke mi preparolis por la freneza knabino.

Efektive la romano ne temas pri ŝia historio. Mi ne bone sciis ŝian familian medion kaj la detalojn de ŝia historio, nek faris pluan enketadon. Ne necesis por mi scii la detalojn, ĉar mi jam havis personojn kaj intrigon en mia cerbo. Mi prenis Xiamen kaj Gulangyu kiel fonon de la romano, ĉar survoje de Shanghai al Jinjiang kaj reirvoje mi iom restis en Gulangyu. Mi ŝatis tiun pitoreskan insuleton. Mi ofte veturis al Xiamen per boato kaj rigardis stelojn surmare en nokto. La printempo ĉe Gulangyu donis al mi profundan impreson. Tiuloke mi ekmemoris alian sudĉinian knabinon, kiu ne freneziĝis sed silente forvelkis. Mi skribis ŝian tragedion en la romano. Zheng Peirong en la romano prezentas tiun knabinon, escepte de tio, ke Zheng Peirong submetiĝis al la volo de sia patro por ke la amato ne estu mortpafita de ŝia patro, dum la knabino en la realo volis forfuĝi kun sia amato spite al ĉio.

Sia familia nomo estis Wu. Ŝi estis ĉina elmigrinto reveninta al la patrolando. Mi ŝin vidis, sed ne bone konis. Jes, mi sciis ŝian malfeliĉan travivaĵon, kaj ankoraŭ simpatie pensas pri ŝi, kiam mi skribas tiun ĉi rememoraĵon post 47-48 jaroj. Mi ŝin vidis en 1930, kiam mi unuafoje vizitis Jinjiang. Foje mi gastis ĉe la Supera Mezlernejo Tagiĝo. Mi iris tien por pasigi la someran libertempon. La lernejestro estis mia amiko, kaj krome tie laboris kelkaj aliaj instruistoj konataj de mi. Proksime de la lernejo estis parko kun kelkaj longanarboj kies fruktoj tiam maturiĝis. Mi promenis en la stratoj kaj stratoj aŭ vizitis la parkon kun amikoj de tempo al tempo. Sed la plejparton de la tempo mi uzis por skribado de novelo aŭ tradukado aŭ imitado de la ekzemplo de mia amiko: tage observadi la vivon de paramencioj kaj amebos sub mikroskopo kaj nokte rigardi stelojn sur la aŭtuna ĉielo sidante sur alta teraso. Iafoje mi ankaŭ helpis per plenumo de diversaj taskoj sidante en la oficejo, ĉar alproksimiĝis la dato por rekomenco de la semestro, kaj tamen la lernejestro malsaniĝis je tifo. Kiam Wu venis por sin registri, mi hazarde estis en la oficejo, mi akceptis ŝin kaj poste ŝin revidis unu- aŭ du-foje en la lernejo. Ŝi estis vigla kaj beleta knabino.

Baldaŭ poste la lernejestro enhospitaliĝis, kaj mi reiris al Shanghai. Kiam finiĝis la semestro, iu amiko tie laborinta kiel instruisto revenis al Shanghai kaj menciis Wu en nia interbabilo. Wu enamiĝis al la anglalingva instruisto. Informiĝinte pri tio, ŝia familio intervenis al ilia afero. Ŝia familio delonge elektis por ŝi fianĉon, kiu estis riĉa sinjoro de tiu provinco kaj unu el la direktoroj de la lernejo. Ankaŭ tiu anglalingva instruisto estis mia amiko. Lia familia nomo estis Guo. Li amis literaturon, ŝatis skribi eseojn. Li estis nur 23-24-jara. Ja estis ordinara afero, ke li vekis kaj akceptis la amon de tiu pasia knabino. Inter ili estis

nur interfluo de tia sentimento, tamen premforto falis sur ilin. La knabino ne volis submetiĝi. En la komenco, la viro estis kritikita kaj poste elpelite el la lernejo fuĝis al Gulangyu kun simpla pakajo kaj vivis tie ĉe iu amiko. La direktoro venkis. La dato por geedziĝo estis plifruigita. La knabino ankoraŭ ne volis kapitulaci, sed kiel ŝi povis eskapi el la kaĝo? Antaŭ la tago por geedziĝo ŝi ŝtele iris al Gulangyu en pluvego por vidi mian amikon. Ŝi diris al li, ke ŝi volonte sekvos lin ĝis la fino de la mondo kaj neniam lin forlasos. Sed pro manko de kuraĝo kaj pro timo ke ŝi devus suferadi en mizeroj kun li, mia amiko rifuzis ŝin. Ŝi reiris hejmen senespere kaj ne plu faris provon por foriri. Soleca morto ŝin atendis.

Tia estis la amhistorio kiun mi skribis. Mi kombinis la malfeliĉajn travivaĵojn de la du knabinoj. Efektive dum mia energia skribado, sufiĉe multaj figuroj aperis en mia kapo kaj mi povis diri multajn nomojn de ili. Unu el miaj kutimoj estis skribi novelojn kaj romanojn por kiuj mi ne havis pretajn titolojn eĉ kiam ili estis finitaj. Kiam mi finskribis la romanon, mi ankoraŭ ne povis elpensi taŭgan titolon. En tiu tempo, mia tradukajo de la mallonga romano "Printempo en la Aŭtuno" estis finaperigita parton post parto en la monata gazeto "Mezlernejano" kaj mi pretigis ĝin por publikigi per Kaiming-librejo. Mi tralegis la tutan manuskripton refoje kaj subite ideo venis en mian kapon, mi trovis titolon por mia romano: "Aŭtuno en la Printempo". Laŭ la titolo kaj la enhavo de la romano mi skribis antaŭparolon. En oktobro de tiu jaro, ambaŭ tradukita kaj originala romanoj eldoniĝis de Kaiming-librejo. La romano "Printempo en la Aŭtuno" estis originale verkita de hungara verkisto Julio Baghy en Esperanto.

Pri "Aŭtuno en la Printempo" mi skribu nur la suprajn vortojn, sed

mia rakonto ankoraŭ ne finiĝis. Post forlaso de Fujian-provinco, mia amiko Guo iris alian lokon por instruado. En tiu tempo estis tre malfacile akiri fiksan laborpostenon por vivteno. Por ordinara intelektoj estis ankoraŭ pli malfacile havigi al si laborpostenon. Se oni ne havis fortan apogon aŭ gravan socian rilaton, oni devis multe klopodi kaj peti helpojn por akiri vivtenan postenon, eĉ se li bone sciis la anglan lingvon kaj scipovis verki eseojn. Kiam mi finskribis la romanon, mi informiĝis, ke Guo laboras kiel instruisto en la Belarta Instituto de Wuchang kaj denove renkontis malfacilon. Li enamiĝis al studentino, aŭ alivorte, ili enamiĝis unu al la alia. La familia nomo de la studentino estis Xu, ŝi estis fianĉinigitita al viro studanta eksterlande, kiu estis pli juna frato de la direktoro de la instituto. Post kiam ilia amo estis konita, la direktoro elpaŝis por interveno. La knabino ne cedis. Ŝia patro enŝlosis ŝin kaj donis al ŝi ŝnuron kaj tranĉilon, ke ŝi sinmortigu aŭ rompu kun Guo. Ŝi ne obeis kaj ŝia patro estis obstina. En la kriza momento, la patrino kaj frato helpis la knabinon kaj ŝi fuĝis el la hejmo. Kun bileto en la mano, ŝi eniris vaporsipon por veturi al Nanjing kaj vivi tie ĉe iu parenco. Ankaŭ Guo enŝipiĝis por ŝin adiaŭi. Ili ambaŭ estis forte emociitaj, kaj en la senfina interparolo Guo decidis ne descendi kaj veturi kune kun ŝi al Nanjing. Ili geedziĝis en tiu urbo. Mia amiko Chen, kiu tiam loĝis en Nanjing, diris al mi poste, ke post sia alveno kun Xu al la urbo, Guo vizitis lin kaj intencis konfidi Xu al li. Post aŭskulto de ilia historio, mia amiko forte kortuŝiĝis, memvole cedis al ili sian ĉambron, ke Guo restu, kaj aranĝis ilian geedziĝon. Chen mortis pro ftizo en la komenco de 1941 ĉe Wuyi-monto en Fujian. Plurfoje li parolis al mi kun admiro pri ilia historio kaj estis kontenta pri si mem pro la cedo de lia ĉambro por ilia feliĉo.

Ankaŭ ĉi tie ne finiĝis la rakonto. Tiu geedza paro naskis du filinojn kaj vivis kvankam ne riĉe, tamen sen malpacigoj en la hejmo. Ili iris de loko al loko, fine fiksloĝiĝis en Shanghai. Guo skribis nombron da eseoj kaj ĉinigitis kelkajn famajn eksterlandajn romanojn. Ilia vivo fariĝis pli sekura ĝis la japanaj kanonoj en la 13-a de aŭgusto de 1937 disrompis ilian malgrandan hejmon, kaj denove ili devis migradi. Kelkajn jarojn post la Liberiĝo, ili venis al Beijing kaj fiksloĝiĝis en Xidan-areo. Mi vizitis ilian domon en la kvindekaj jaroj. Guo maljuniĝis kaj fariĝis ne tiel parolema kiel en la junaj jaroj, sed li ridis pli multe. Mi pensis, ke ili povos tiel vivi en feliĉa geedzeco ĝis la fino. Sed la ungegoj de la kvarpersona bando etendiĝis ankaŭ al iliaj kapoj. Kiam la frapego falis, nur Xu estis hejme; tiam Guo instruis en Jinan-universitato en Guangzhou kaj la

filinoj laboris aliloke. Ilia domo do estis konfiskita, la loĝanto estis "elbalaita" kaj Xu estis eskortita al Guangzhou. Tiam ŝia edzo jam estis fermita en "ĉelo por monstroj kaj demonoj" kaj neniu en Guangzhou povis ŝin akcepti. Do ŝi estis eskortita al ŝia hejmloko. Pli poste ŝi iris vivi ĉe sia filino. Je la fino de la lasta jaro, mi ricevis neatendite ŝian leteron, en kiu ŝi diris al mi interalie, ke en somero de 1968 ŝi ricevis sciigon de la universitato, kiu informis ŝin, ke ŝia edzo "mortis pro sveno dum fizika laboro en varmega tago". Do li mortis en somero de 1968. Nun finiĝis mia rakonto. Ĉu mi povis atendi tian finon, kiam mi skribis la "milde ploran rakonton" en printempo de 1932? Ne nur mi ne, ĉu la knabino, kiu ne klinis sian kapon antaŭ la ŝnuro kaj tranĉilo, povis imagi al si, ke ŝi skribos al mi tian leteron post 45 jaroj?

Forpasis jam la pasintajoj. Sed hodiaŭ kiam mi relegas la malnovan verkon, klare mi revidas la okazintaĵojn antaŭ pli ol kvardek jaroj. Per kio mi konsolu la familianojn de la forpasinta amiko? Eble oni jam forgesis mian amikon. Sed lia kontribuo en disvolvo de niaj modernaj eseoj ne estos forgesita de la esplorantoj pri la historio de la ĉina moderna literaturo. Ĉe mi troviĝas tri libroj de eseoj "Oferto ĉe Vesperigo", "Kanto de Aglo" kaj "Blanka Nokto" verkitaj de li en la tridekaj jaroj kaj ankaŭ ĉinaj versioj de la romanoj "Nesto de Nobeletoj" kaj "Antaŭvespere" tradukitaj de li kaj versio de la romano "Rodin" polurita de li. Mi ofte ilin legos. Ili havas rajton ekzisti. Tial do ankaŭ la memoro pri tiu ĉi bonkora homo restos kune kun ili.

La aŭtoro, julio, 1978

Nova libro

Jus eldonita de El Popola Ĉinio

BA JIN

Aŭtuno en la Printempo



Mallonga romano de fama ĉina verkisto Ba Jin. En poezia lingvo li rakontis amhistorion de juna paro en la malnova Ĉinio. Per sango kaj larmo li skribis la romanon dezirante, ke ĉiu havu printempon kaj feliĉon.

La aŭtoro estas ankaŭ veterana esperantisto. Li

tradukis la romanojn "Printempo en la Aŭtuno" de Julio Baghy en la ĉinan lingvon kaj inversigis la titolon por nomi sian propran romanon, kiun oni rigardas kiel fratinan verkon de tiu de Baghy. Se vi jam legis la antaŭan, ĉu ne estas interese legi ankaŭ la lastan?

Esperantigis Laŭlum
Ilustris Yao Youxin

148 × 210mm. 116 paĝoj
Numero: 10Es-1525

Prezo: broŝ. £2.40 US\$4.90
bind. £2.90 US\$5.90

Mendu ĉe:

Peranto de "El Popola Ĉinio" en via lando
Universala Esperanto-Asocio
Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN,
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

KARDELJ EN ESPERANTO

En Esperanto baldaŭ aperos libro "Historiaj Radikoj de Nealianciĝo" kies aŭtoro estas Edvard Kardelj, konata jugoslavia socialisma teoriulo kaj pensulo, forpasinta komence de 1979. Efektive ĝi estas ampleksa studo kiun Kardelj prezentis dum la internacia konferenco "Fortoj kaj vojoj de la milito kaj paco" okazinta en 1975 en Zagreb. La libron eldonos Esperanto-Ligo de BkH.

UTILA KUNLABORO INTER OASĜ KAJ UEA

La Organizo de Amerikaj Ŝtatoj kaj Universala Esperanto-Asocio starigis formalan kunlaboron precipe sur la kampo de kulturo kaj intelektaj interŝanĝoj. OASĜ tiel partoprenigos UEA-n en sia laboro kaj interkonsiliĝos kun ĝi pri komunaj interesaj aferoj. Tiel UEA estas konata kiel grava kultura kaj komunika organizaĵo en Ameriko.

KUN JUGOSLAVA ESP-ISTINO EN LA SOMERA PALACO

En la lasta printempo ĉinaj esperantistoj intervidiĝis en Beijing kun kamaradino Cvetanka Tubič, reprezentantino de la redakcio de la jugoslava Esperanta revuo "Voĉo". Ŝi vojaĝis al Ĉinio kun la turisma grupo organizita de la Jugoslava Civila Aviada Kompanio. En la ĉarma Somera Palaco en la okcidenta antaŭurbo de Beijing, ĉinaj kaj jugoslava geesperantistoj havis agrablan tagon, en kiu ili ĝoje interbabilis.

LA ĈINA VERKO "MONTARA VILAĜO" TRADUKATA EN ESPERANTON

La nomita romano de ĉina fama esperantisto kaj verkisto Ye Jun-jian (ankaŭ konata sub la esp-a pseŭdonimo Cicio Mar) estas tradukata en Esperanton de M. W. Auld, la nova prezidanto de la Akademio de Esperanto.

INFORMOJ EL BRITIO

La 6-an de marto, la Esperanto-grupo de Britaj Parlamentanoj okazigis kunvenon en komitat-ĉambro de la Parlamentejo. 21 parlamentanoj ĝin ĉeestis kaj aŭskultis prelegojn de eminentaj esperantistoj. Rezulte la grupo tuj akiris 5 novajn membrojn kaj pluaj aliĝoj jam sekvas. La grupo nun havas 108 membrojn.

Sekve de la rezolucio favora al Esperanto de MFAUN (Monda Federacio de Asocioj de Unuiĝintaj Nacioj), la Esperanto-Asocio de Britio presigis milojn da kopioj de la anglalingva dokumento, bonege verkita por MFAUN de Nov-Zelandoj Prof. C. J. Adcock kaj S-ro W. R. Aldridge, por distribuo al la multnombraj lokaj filioj de la AUN en Britio, diversaj eminentuloj, k.s.

Pasintjare brita esperantisto Les Hartridge verkis "Senpagan Enkondukan Korespondan Kurson" kiu montriĝis tiel efika, ke en oktobro la Esperanto-Asocio de Britio transprenis la presigon kaj distribuadon de la kurso kaj starigis reton de instruistoj tra la tuta lando.

ALQCIERIAS INVITAS VIN AL KUNVIVADO

Antaŭ nelonge naskiĝis la Esperanto-grupo de Alquerias. La grupo invitas esperantistojn de alilandaj

E-grupoj vivi kune kun ĝiaj membroj. La gastoj povos tie manĝi kaj dormi senpage unu, du, tri aŭ kvar semajnojn. La tempo por la kunvivado estos inter majo kaj decembro, ĉar la vetero en tiu tempo estas multe pli agrabla. Ili esperas, ke la membroj el la eksterlanda E-grupo devas esti 4 aŭ 5 gejunuloj kun la aĝo de 15-25 jaroj. La adr.: "Grupo Esperantista de Alquerias", Asociacion de Vecinos, Alquerias (Murcia), Hispanio.


NOVA INTERNACIA FAKORGANIZO FONDITA

Dum la 23-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Würzburg, je la 3-a de januaro fondiĝis nova fakorganizaĵo: la Biciklista Esperanto-Movado Internacia. Ĝi celas disvastigi bicikladon inter esperantistoj kaj Esperanton inter biciklistoj. BEMI enkondukos biciklajn ekskursojn dum la Esperanto-kongresoj kaj renkontiĝoj kaj helpos la novajn biciklantojn per informoj kaj kursoj pri ekz. riparado. Ĝi petas esperantistojn sendi al ĝi raportojn pri la situacio de la biciklantoj en ilia urbo aŭ lando, kaj membriĝi al la organizaĵo.

LA 67-A KONGRESO DE JAPANAJ ESPERANTISTOJ

La nomita kongreso okazos en la 23-a kaj 24-a de aŭgusto en Memordomo de la Haveno Jokohama. La programo konsistas el ĝenerala kunsido de JEI, fakaj kunsidoj, simpozio de lokaj E-movadoj, infana kongreseto, enkonduka E-kurso por la civitanoj, publika prelegkunveno kaj kongresa ĝenerala kunsido.

Fame konata dram-verkisto prelegos pri la filmigo de esperantistino Hasegawa Teru (Verda Majo). Ŝia vivo estis surfilmigita en kunlaboro de Japanio kaj Ĉinio.



En somero (Ŝtona skulptaĵo)





de LU BO

Ekskurso al Badaling

Fotoj de WANG WEIQIANG

La Granda Mu-
ro ĉe Badaling

Por memoro




Ne pre atingi la plej altan punkton de la muro.

Por vidi pli malproksime,
oni devas grimpi pli alten.



Descendo neniom pli facilas ol la ascendo.



Jen la Granda Muro!



Badaling estas unu el la gravaj pasejoj de norda Ĉinio. Ĝi situas 45 kilometrojn nordokcidente de nia ĉefurbo Beijing kaj estas vizitata de turistoj en la tuta jaro pro tio, ke ĝin trapasas bone konservita parto de la Granda Muro. Starante sur la plej alta loko de la Granda Muro en Badaling oni povas vidi ke la antikva murego serpentumas kvazaŭ granda griza drako sur verdaj montoj. Nun turistoj povas rekte atingi ĝin per speciala trajno.



Tom ripozu!




Kiel interese sin
foti en antikva
vesto!

Pikniko ĉe la Granda Muro



Turistoj el suda Azio ĉe Badaling

Butiko de memorajoj





Jugoslavia Esperanto-Movado

de SENAD ĈOLIĈ, Jugoslavio

VIGLA KAJ SOCIE ENGAGITA

Dum la lastaj jaroj jugoslavia Esperanto-Movado troviĝas en dinamismaj transformiĝoj. Tion kaŭzis unuflanke gravaj organizaĵaj ŝanĝoj en socipolitika sistemo de la lando, kaj aliflanke serioza analizo de la loko kaj rolo de la organizita Esperanto-Movado en la socio. Pritaksante objekte staton de la Esperanto-Movado en Jugosla-

vio de antaŭ deko da jaroj, oni povis konstati ke ĝi laŭ la proklamitaj celoj kaj taskoj pretendis esti konsiderinda socia faktoro, sed ke ĝi laŭ siaj internaj organizaĵaj formoj kaj precipe agadprogramoj neniel povis redoni tian karakteron. La Esperantaj organizaĵoj estis plejparte enfermitaj en si mem, turnitaj per siaj agadoj kaj "interna vivo" al mallarĝaj, privataj interesoj de la membroj. Per

tia ĉiam pli granda memizoliĝo de realaj sociaj fluoj, kreiĝis psikologia fendo inter la pretendoj kaj efektivaj eblecoj, kiu rezultis en malkapablo formuli kaj artikuligi siajn postulojn en socie akceptebla formo. Pro tio al la Movado trudiĝis la neceso urĝe reformiĝi, unuavice kunligi kun aktualaj sociaj fluoj, analizi ilin, serĉi sian lokon en ili kaj laŭeble en certaj sferoj ilin ankaŭ influi. Des pli tio necesis, ĉar la jugoslavia socia-



Dum la inaŭguro de la Internacia Junpionira Renkontiĝo en Pale en 1979

listma sistemo laŭ karaktero de la interna evoluo, kiel la mem-administra socialisma komunajo de egalrajtaj popoloj kaj nacioj, kaj laŭ karaktero de la eksterpolitika orientiĝo, kiel la nealiancita lando batalanta en la internaciaj rilatoj por egalrajteco kaj kunlaboro inter ĉiuj landoj, prezentas reale idealajn kondiĉojn por larĝa disvolvo de pri-esperantaj aktivecoj kaj konfirmo de la Internacia Lingvo kiel progresema socia faktoro.

HISTORIAJ SPERTOJ

Sed, ekintaj ŝanĝoj en la jugoslavia Esperanto-Movado estis tamen bazitaj sur certaj fundamentoj. Ili efektive havis siajn radikojn en historio de la Movado mem. La Esperanto-Movado dum pli ol 70-jara ĉeesto sur teritorio de la nuntempa Jugoslavio, apartenis en ĉiuj siaj fazoj al plej progresemaj sociaj moviĝoj. Ekde la komenco, ankoraŭ antaŭ la unua mondmilito, la Esperanto-organizaĵoj arigadis anojn de diversaj nacioj, kontraste al aliaj tiamaj ekskluzive ununaciaj asocioj. Post la milito ili arigadis anojn de plej malsamaj sociaj devenoj, precipe fortigante siajn poziciojn en la laborista movado kaj en la vicoj de progresema intelektularo. Esperanto ĉeestis jam en dokumentoj de la dua kongreso de Komunista Partio de Jugoslavio en Vukovar en 1920, la Esperanto-Movado dividis sorton de la laborista movado inter la du mondmilitoj, ĝiaj organizaĵoj malpermesigis kaj membroj estis persekutataj, la Internacian Lingvon oni studis en kazematoj — kion emfazis ankaŭ kamarado Tito

en siaj prelegoj pri batalo de la Komunista Partio inter la du mondmilitoj, aktivistoj de la Esperanto-Movado en grandega plimulto sekvis inviton de la Komunista Partio de Jugoslavio kaj aliĝis al la popolliberiga movado kaj la kontraŭfaŝisma batalo. En la popolliberiga milito pli ol 300 esperantistoj pereis, el kiuj ĉirkaŭ 30 estas proklamitaj popolaj herooj. En la nova socialisma Jugoslavio la Esperanto-organizaĵoj donis sian kontribuon al pli rapida socia evoluo, firmigo de sendependeco de la lando kaj al amikigo de la jugoslaviaj popoloj kaj nacioj kun popoloj de aliaj landoj. Do, observante el la propra historia sperto la Esperanto-Movado nur estante en fronto de progresemaj sociaj fortoj povas fakte pretendi sociigon de siaj celoj.

LA MOVADO JUNIĜAS


Gravas ankoraŭ aldoni ke en la Esperanto-movado mem oni fine ekkomprenis, ke lingva problemo en ĉiuj ĝiaj aspektoj estas socia problemo kaj ke ĝi ne

povas esti privata afero de esperantistoj, sed ke ĝi koncernas multe pli larĝajn sociajn tavolojn, senkonsidere ĉu ili rekte okupiĝas pri la Internacia Lingvo aŭ ne. La nuntempan Esperanto-Movadon en Jugoslavio karakterizas ĝuste reatingado de ĝia socia profilo kaj konsiderinda larĝigo de ĝia fona idearo.

Dum lastaj kelkaj jaroj en gravaj sociaj dokumentoj oni rekonfirmis Esperanton kaj ties organizaĵojn kiel socie utilajn faktorojn, precipe por socialisma edukado kaj ideo-politika orientado de la junularo. Sekve de interna reorganiziĝo de Jugoslavia Esperanto-Ligo en iuj respublikoj, unuavice en Bosnio-Hercegovino kaj Kroatio, oni jam atingis ke la Esperanto-asocioj estas konsiderataj kiel "sociaj organizaĵoj de aparta socia intereso", kaj tiudirekte okazas transformiĝo ankaŭ en aliaj respublikoj.

El agada vidpunkto la tuta aktiveco estas ĉiam pli ŝovata al la bazo, al fortigado de lokaj organizaĵoj kaj formigado de pluraj novaj en lernejoj, labor-

Leciono en Esperanto al diverslandaj junpioniroj dum la renkontiĝo en Pale, 1979





Emblemo de la 9-a Internacia Laborbrigado de Esperanto-Junularo laborinta en 1978, ĉe la granda junulara laboraranĝo "Samac-Sarajevo 78"

organizoj kaj lokaj komunaj, kie efektive vivas kaj laboras popolanoj, kaj precipe junularo. Per tio oni treege larĝigis organizan bazon de la Movado. Krome, priesperantaj organizaĵoj subite ĉiam pli konstituigas kiel poresperantaj organizaĵoj en kiuj asociiĝas ĉiuj civitanoj kaj gejunuloj kiuj pro sia persona orientiĝo estas simple *por Esperanto*, kaj implice kontraŭ ĉiuj formoj de malegaleco, diskriminacio kaj hegemonio en la internaciaj rilatoj.

Tia plena malfermiĝo de la organizaĵo ne nur grave amasigas niajn vicojn, sed kreas multajn novajn bezonojn pri adekvata reformulado kaj rekonceptado de niaj agadprogramoj kaj de la "tradiciaj" aktivecoj. Spertoj tiurilate ĉiutage kolektiĝas kaj novaj kvalitoj aperas. La ĉefa karakterizaĵo de la aktuala stato de la Esperanto-Movado en Jugoslavio nepre do estas, senprecedence forta junigado de la Movado, tiel ke oni povus aserti ke ĝi momente es-

tas laŭaĝe plej juna en sia longjara historio.

MULTFACETA AGADO

Kiuj konkretaj aktivecoj povus plej trafe ilustrati la nuntempan jugoslavian movadon? Jen kelkaj ekzemploj.

Dum la 1978-jara Internacia Jaro de la Infano, kiun proklamis Unuiĝintaj Nacioj, okazis sukcesaj internaciaj infanaj renkontiĝoj en Pale (Bosnio-Hercegovino) kaj Zagreb (Kroatio). En Zagreb ankaŭ okazis jam la 12-a laŭvice Pupteatra Internacia Festivalo, kaj krome diversaj aliaj aktivecoj sur regiona kaj loka niveloj.

En la Jardeko por Kontraŭbatali Rasismojn kaj Rasan Diskriminacion, kiun en 1973 proklamis Unuiĝintaj Nacioj, Jugoslavia Esperanto-Ligo kunlabore kun kelkaj sociaj kaj sciencaj institucioj organizis malferman internacian seminarion en 1976 en Sarajevo sub la temo "Lingvo kaj Rasismo". En 1978 aperis en la serbokroata lingvo kolekto de referaĵoj el tiu ĉi ege grava scienca aranĝo.

Jugoslavio estas evolulando kaj en ĝia konstruado grandegan kontribuon donis kaj daŭre donas junularo. Ankaŭ la Esperanto-Junularo partoprenas en tio. Ĝi organizis ĝis nun naŭ laborbrigadojn kiuj partoprenis en konstruado de gravaj sociaj kaj ekonomiaj objektoj. La lasta brigado — kiu havis internacian karakteron — laboris en 1978 ĉe la granda laboraranĝo "Samac-Sarajevo 78", helpante kune kun aliaj 25,000 gejunuloj konstruadon de la fervojo.

Plia notinda aktiveco estas vigla eldonagado. Plej signifaj lastatempe publikigitaj verkoj estas la paroladoj de prezidanto

Tito en konferencoj de nealiancitaj landoj sub titolo "La Nealianciteco — Konscienco de la Homaro", kaj plej nova studo de Edvard Kardelj, pasintjare forpasinta granda jugoslavia revoluciulo kaj marksisto, "Historiaj Radikoj de Nealianciĝo". El la kultura heredaĵo aperis ekzemple novelaro de la sola jugoslavia nobelpremiito Ivo Andrić "Songo kaj Maldormo sub la Karpeneto", la mondfama bosnia popolbalado "Hasan-againo", la montenegra ĉefverko "La Montara Krono" de Njegoš, Makedonaj popolaj rakontoj, kaj laste impona "Moderna Kroata Prozo". Pluraj aliaj libroj ne estas menciitaj, kaj multaj novaj titoloj atendas aperigon.

Instruado de la lingvo estas tradicie zorge flegata. Lernolibroj kaj vortaroj de Esperanto ekzistas en la lingvoj serbokroata, slovena, makedona kaj baldaŭ aperos ankaŭ en la albana, kio kontribuas ke la Movado egale disvolviĝas en ĉiuj regionoj. La Internacia Lingvo estas en oficialaj dokumentoj de edukaj instancoj traktata kiel socie utila aktiveco de gelernantoj. Tiurilate tre helpis oficiala kvinlanda eksperimento pri instruado de Esperanto en elementaj lernejoj kiun de 1971-74 sukcese kunordigis Slovenia Esperanto-Ligo.

Ne estas kompreneble ĉi tie loko kaj bezono nombradi plurnajn kaj plej diversajn manifestaciojn, renkontiĝojn, seminariojn kaj aliajn aktivecojn organizatajn de lokaj aŭ regionaj organizaĵoj, kiuj certe povus kompletigi bildon pri tre larĝa kaj vigla agado de la jugoslavia Esperanto-Movado antaŭ kiu sendube troviĝas vastaj eblecoj kaj bonaj perspektivoj.

VERDA URBO VARSOVIO

EN serena tago, kiam vi rigardas tra fenestro de aviadilo aŭ de sur la supro de la Scienca kaj Kultura Domo, vi povas ĉirkaŭpreni la tutan panoramon de la urbo per la okuloj: Ambaŭflanke de la strato "Marŝalo" staras altaj domegoj kaj verdaj arboj, gazonoj apud ĉefaj stratoj kaj ŝoseoj interligiĝas unu kun alia kaj etendiĝas foren, kaj Varsovio aspektas kvazaŭ giganta ŝipo ankranta sur la maro.

Tamen, ĉe la finiĝo de la Dua Mondmilito la urbo havis tute alian aspekton: Ambaŭflanke de stratoj restis nur rompitaĵoj muroj, ĉie videblis ruboj, sur la gazonoj fosiĝis tranĉeoj kaj arboj dise falis. Tiam 85% de la domegoj estis faligitaj kaj 60% de la verdejoj detruitaj. Varsovio estis simple ruino.

Dank' al multjara klopodado de la pola popolo, Varsovio ŝanĝiĝis radikale. Nun ĝi havas 65 ĝardenojn kaj 12,600 hektarojn da verdejoj, kies areo estas 31.5-oblo de tiu en 1945. Ĉiu urbano okupas meznombre 77.7 kvadratajn metrojn da verdejo. Ĉi-flanke Varsovio okupas la unuan lokon inter la ĉefurboj de ĉiuj landoj en la mondo.

En la historio la arbaroj de Varsovio estis plurfoje detruitaj de militoj. En 1945 la urbo havis nur 400 hektarojn da verdejoj. Ĝuste pro tio, Bierut, la unua prezidanto de la Pola Popola Respubliko, prenis la verdigon de la urbo kiel ĉefan taskon por rekonstrui Varsovion kaj faris alvokon "konstrui Varsovion en

verdan urbon". La pola parlamento ellaboris arbaran leĝon kaj aliajn dekretojn por protekti la naturajn riĉfontojn, kuraĝigi forstumadon kaj verdigi la patrolandon. Por plifortigi la gvidadon super tiu laboro la pola registaro speciale fondis Ministerion pri Loka Administrado kaj Medioprotektado kaj ĉiujare disponigis al Varsovio 250 milionojn da zlotoj por tiu celo.

La verdiga laboro en Varsovio iras laŭplane. En la komenca periodo post la liberiĝo ĝi estis parto de la ĝenerala plano por rekonstrui Varsovion kaj poste metita en la unuigitan planon de la ĉefurba ekonomia disvolviĝo. Dank' al tio la verdiga laboro rapide progresis. En la pasinta jaro la verdejoj ambaŭflanke de ĉiuj stratoj kaj ŝoseoj kaj ĉirkaŭ la loĝdomoj pliiĝis je 250 hektaroj. La Popola Komitato de Varsovio faris decidon, ke estas absolute malpermesate fari konstruadon de minejoj, fabrikoj, lernejoj, komercejoj kaj aliaj instalaĵoj, kiu ne inkluzivas verdigon de la medio. Tial la disvolviĝo de la urba verdigo ĉiam akompanas tiun de ekonomio kaj kultura afero.

El la totala areo de la verdejo 58% estas prizorgataj de la Urba Ĝardena Kompanio, 21% de lernejoj, fabrikoj, kulturaj, sportaj kaj sociaj rondoj, 11% de la loĝantaraj komitatoj kaj 10% de individuoj. Krom konstanta verdiga laboro fare de specialaj taĉmentoj, verdigaj grupoj kaj individuoj, la urba registaro

ĉiujare organizas volontulojn por arboplantado en printempo kaj aŭtuno aŭ en gravaj festotagoj. En la laboro partoprenas ŝtataj gvidantoj, ministroj de la registaro, laboristoj, oficistoj, instruistoj kaj personoj el diversaj rondoj. Okaze de la 1,000-a datreveno de la fondiĝo de Pollando en 1965, disvolviĝis en Varsovio la amasa aktivado "Celebru la 1,000-an datrevenon kaj plantu 1,000 arbojn". En 1979, dum celebrado de la 35-a datreveno de la fondiĝo de la Pola Popola Respubliko, loĝantoj de Varsovio kaj aliaj urboj plantis 11 milionojn da arboj.

En la unuaj tagoj de januaro ĉiujare plurfoje neĝis en Varsovio kaj la temperaturo falis al pli ol 10 gradoj sub nulo, tamen la gazonoj ambaŭflanke de la stratoj montriĝis ankoraŭ verdaj. Kial? Kun tiu demando mi konsultis unu polan ĝardeniston. Li diris: "Ĉiuj herboj velkas, tamen ili diferencas unuj de aliaj en la tempo de kreskado kaj velkiĝo kaj kontraŭfresta povo. Ĉi tie estas mikse plantitaj sep specioj de herboj kun malsama velkiĝtempo, por ke la gazonoj tenu sian verdon en ĉiuj sezonoj."

Nun sur la balkonoj de la loĝdomoj en Varsovio kreskas diverskoloraj floroj en vazoj. La tabuletoj kun atentigoj "Nepre ne deprenu floron" kaj "Treti la gazonon estas malpermesate" ne plu ekzistas, ĉar ĉiuj urbanoj jam alkiutimiĝis amzorgi florojn kaj herbojn.



EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ

Gastado en ŝe-a vilaĝo

de XIAO XUESHENG

TRANSGRIMPINTE plurajn krutajn montojn, mi forte anheligis kaj ŝvitis tutkorpe. Mia vojevadisto Lei Fengde, juna kadro de ŝe-a nacieco, kuraĝigis min: "Vidu, ni baldaŭ atingos." Mi rigardis en la direkto montrita de li kaj vidis, ke ne tre klare konturiĝas vilaĝo sur la malproksima montodeklivo.

Mia celloko estis la vilaĝo Jiulong, unu el la 700 ŝe-aj vilaĝoj de la gubernio Fu'an de orienta Fujian-provinco.

La nacieco ŝe nombras 300,000 membrojn kies kvinono loĝas en la gubernio Fu'an. En la historio, pro la diskriminacio kaj persekutado fare de la han-naciecaj regantoj, plejparto de la ŝe-oj dise loĝis en monto. Post la Liberiĝo en 1949, parto el ili translokiĝis de sur la montoj. En mia ĉifoja vizito mi vidis la translokiĝon de iu vilaĝo, kiu situas en la loko minacata de falado de rokoj. La komunuma komitato disponigis al ili sumon da mono por ke ili konstruu novan vilaĝon sub la monto. Sed ankoraŭ multaj ŝe-aj vilaĝoj preferas loĝi sur la montoj kiel kutime. Malgraŭ tio, ilia vivo multe pliboniĝis ol antaŭ la Liberiĝo.

Apenaŭ enirinte la vilaĝon, mi aŭdis tamburadon kaj gongadon en templo ĉe la vilaĝgrando. Tie oni estis prezentanta

tradician teatraĵon. Estis fruvintro de 1979. Jam finiĝis la rikoltado de rizo kaj la semado de travintraj plantaĵoj. Profitante la neokupatan tempon la produkta brigado invitis alivilaĝan amatoran ensemblon prezenti por du tagoj. La prezentado ne estis altnivela, kaj la "teatro" estis malmoderna, sed ĝi estis plenplena de spektantoj sorĉe interesataj.

Kun pliboniĝo de la vivo de ŝe-a popolo formiĝis tie la kutimo: Se en iu vilaĝo okazas prezentado, la vilaĝanoj ĉiam invitas siajn parencojn aŭ amikojn

en najbaraj vilaĝoj al la aprezo de teatraĵoj. Ju pli multnombraj estas la gastoj, des pli ĝojas la gastigantoj, ĉar tio montras prosperecon de la vilaĝo. Kompreneble ankaŭ mi, kiel ĉefurbano, estis bonvena al ili en tiu tempo. Oni konkure invitis min al sia hejmo por regali min per manĝo, kaj mi devis gastigi ĉe ili laŭvice.

La vilaĝo havas nur 54 familiojn dise loĝantaj sur la montodeklivo. La domoj de la vilaĝanoj estas tre similaj unu al alia. Ĉiu domo, ĝenerale, estas ĉirkaŭata de alta tera muro. Antaŭ la domo estas korto, kie

Ŝe-aj virinoj



oni bredas porkojn kaj kortobirdojn. Transe de la korto estas duetaĝa domo el ligno. La meza ĉambro de la unua etaĝo servas kiel salono, kaj ambaŭflanke de ĝi estas dormoĉambroj. Post tiuj estas kuirejo kaj manĝejo. La mansardo estas uzata por konservi grenon kaj hejtajojn, kaj nur tre malmultaj familioj prenas ĝin kiel dormoĉambron. En unu korto loĝas ĝenerale du familioj de la gepatroj kaj la filo, aŭ de du fratoj. Ili vivas ne en unu familio, sed tre harmonie.

Fengde kondukis min en la domon de Zhong Maodi. La familio ĵus vespermanĝis kaj estis babilanta kun gastoj invitatitaj al aprezo de teatraĵoj. La mastro entuziasme sidigis min kaj regalis min per teo. Maodi estas 50-jara. Li vestis sin same kiel han-oj. La ŝe-aj virinoj tamen havas sian apartan vestadon, plejparto de la junaj knabinoj ŝatas han-ajn vestojn. Lia 47-jara edzino portas ŝe-naciecan kostumon. Ŝiaj haroj estis volvitaj ĉirkaŭ la kapo kaj fiksigitaj bonorde per ruĝaj lanaj fadenoj kaj arĝenta pinglo. Ŝia blua negliĝo kun vasta klapo estas garnita per belaj pasamentoj. Estis bedaŭrinde, ke pro la lingva baro ni ne povis senpere interŝanĝi vortojn. Tamen Fengde estas diplomito de supera lernejo kaj povas bone paroli en la han-a lingvo, kaj dank' al lia interpreto ni komprenis unu la alian.

Maodi multe suferis en sia juneco. Li kaj liaj patro kaj frato farmis tri muojn da kampo de bienulo. Sur la sterila sabloza tero ili penlaboris dum la tuta jaro, sed rikoltis malmulte, kaj krome, pli ol duono de la rikoltajo devis esti donita al la


bienulo. Kaj la restinta greno sufiĉis por nutri ilin nur dum 7 monatoj. Kaj tial ili devis dungigi, vendi hejtajojn kaj kolekti manĝeblajn sovaĝajn herbojn por kovri la mankon de greno. Kiam Maodi estis rakontanta al mi la amarajn travivaĵojn, liaj du junaj filoj mire staris apude. La travivaĵoj de ilia patro estas por ili malfacile kompreneblaj kaj eĉ neimageblaj. Kiam ili ekpovis memori ion, ili jam loĝis en nova domo, kaj neniam suferis de malsato kaj frosto. Ili ĉiutage kun ĝojo vizitas lernejon en la vilaĝo. Du instruistinoj instruas al ili legon, kanton kaj ludon. Kaj post kiam la vilaĝo estis ekipita per dizela generatoro, ili povis fari hejmtaskon sub elektra lampo.

95% de la vilaĝanoj estis farmuloj kaj ĉiu el ili multe suferis kiel Maodi en la pasinteco. Iu maljunulo diris al mi, ke en sia juneco, por fuĝi de perforta rekrutado, li ofte kaŝis sin en kabano en profunda monto. Li vivis tie sume 12 jarojn suferante ĉiajn amaraĵojn. Alia maljunulo diris, ke antaŭ la Liberiĝo la ordinaraj ŝe-oj eĉ ne havis la rajton konstrui por si domon. Kiu volis konstrui por si domon, devis multe pagi al bienulo kontraŭ la tero por domo, kaj cetere estis malpermesate al ili meti angulŝtonon. Por montri sian aŭtoritatecon, bienuloj en iuj vilaĝoj eĉ ne permesis al siaj farmantoj havi tablon dum manĝado. Sed nun ĉiuj familioj havas sian propran domon, kaj duono de la domoj estis konstruita en la lastaj jaroj. En la vilaĝo mi vizitis ankoraŭ aliajn du maljunulojn, kiuj migradis aliloken kaj almozpetis antaŭ la Liberiĝo. Nun baldaŭ geedziĝos iliaj infanoj. La familio de la

fianĉino estis preparanta meblojn kiel dotajojn kaj tiu de la fianĉo jam pretigis novan domon. Alparolante min pri ĉio ĉi, ambaŭ maljunuloj montris koran ĝojon sur siaj vizaĝoj.

Sur la draŝejo meze de la vilaĝo gvidantoj de la produkta brigado estis farantaj kalkulon pri produktado kaj distribuado per abako. En la sepdekaj jaroj la brigado organizis la vilaĝanojn por konstrui irigacian sistemon, planti fruktoarbojn kaj bredi porkojn kaj ŝafojn. En 1979 la meznombra hektara produktokvanto de greno atingis 9 tunojn kaj la totala produktokvanto de greno 170 tunojn, t.e. 3.4-oblo de tiu en la jaro tuj post la Liberiĝo. Pli kaj pli riĉiĝis la vilaĝanoj. La kolektivo havis rezervitan grenon kaj akumulitan monon. En la lastaj jaroj la vilaĝo ekipis sin per traktoroj, dizeloj, draŝmaŝinoj, rizosenŝeligaj maŝinoj kaj muelmaŝinoj, kiuj multe malpezigis la laboron de la vilaĝanoj. Kompare kun avangardaj lokoj de la han-a nacieco, la vilaĝo havis rimarkindajn mankojn, sed tamen ĝi vere multe progresis sur la origina bazo de malklera kaj postĝinta vilaĝo.

Kiam mi estis forlasanta la vilaĝon, multaj varme akompanis min ĝis la rando de la vilaĝo. Premante mian manon ili diris foje kaj refoje, ke mi venu denove al ili. Irante malsupren de sur la monto, Fengde diris al mi: "Oni jam faris esploradon kaj mezuradon por baldaŭ konstrui ŝoseon. Se vi venos denove post kelkaj jaroj, eble vi ne bezonos grimjadi piede, kaj tiam ni povos porti vin per traktoro rekte al la vilaĝo."



EL ĈINA MODERNA HISTORIO

La Norden-

Ekspedicia Milito

de TING XIAO

POST kiam la Revolucio de 1911 gvidata de Sun Zhongshan (Sun Jatsen) renversis la registaron de Qing-dinastio (1616-1911 p.K.), li enoficiĝis kiel la unua prezidanto de Ĉinio en Nanjing (Nankino) en januaro de 1912. Sed post malpli ol unu kaj duona monatoj li devis rezigni la oficon sub premo de la fortoj de la nordaj militaristoj*. Yuan Shikai, ĉefo de la nordaj militaristoj, intrige uzurpis la prezidantecon kaj translokiĝis de Nanjing al la nova ĉefurbo Beijing (Pekino). De tiam Ĉinion superregis la nordaj militaristoj dum 15 jaroj, en kiuj interbatalis militaristoj kaj la popolo vivis en ekstrema mizero.

En tiu periodo la ĉina revolucia forto iom post iom akumuliĝis kaj disvolviĝis en la meza kaj suda partoj de Ĉinio. Kuo-mintango gvidata de Sun Zhongshan fondis la Nacian Registaron en Guangzhou (Kantono). Ĝi formis revolucionan unuecfronton kun la Komunista Partio de Ĉinio en politiko, per sia relative forta armeo ekstermis militaristojn kaj reakciajn fortojn en Guangdong kaj fondis fortikan revolucionan bazlokon. Ĉio ĉi tio metis bazon por ekstermi poste la nordajn militaristojn.

Tiam granda parto de la ĉina teritorio estis sub la regado de

la nordaj militaristoj, inter kiuj Wu Peifu posedis 200,000 armeanojn kaj regis la provincojn Hunan, Hubei kaj Henan en la meza parto de Ĉinio, Sun Chuanfang kun siaj 200.000 soldatoj regis la provincojn Jiangsu (Giangsu), Zhejiang (Ĝegiang), Anhui, Fujian (Fugian) kaj Jiangxi (Gianghi) en la orienta kaj sudorienta partoj de Ĉinio kaj Zhang Zuolin, kiu posedis 350.000 armeanojn, regis la tri provincojn en la Nordoriento de Ĉinio kaj Hebei kaj Shandong (Ŝandong). Koluziante respektive kun la imperiismaj landoj Britio, Usono, Francio kaj Japanio, ili bataladis inter si por plivastigi sian influferon. Sed fronte al disvolviĝantaj popolaraj revoluciaj fortoj ili provizore unuiĝis por ekstermi ilin. Inter tiuj militaristoj la forto de Wu Peifu estis la plej granda kaj ankaŭ lia ambicio la plej arda. Li eĉ intencis unuigi Ĉinion per siaj fortoj, tial li estis la plej feroĉa malamiko de la popolo.

Koluziante kun imperiistoj, tiuj feŭdaj militaristoj faris kruelan ekspluatadon kaj subpremado al la popolo, kaj per tio instigis ĝin al kontraŭstaro. La sloganoj "For la imperiistojn!" "For la militaristojn!" k. s. aŭdiĝis ĉie en la popolamasoj. En 1925, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio

ekplodis en Shanghai (Ŝanhajo) grandskala kontraŭimperiisma patriota Movado de la 30-a de Majo, kiu rapide disvastiĝis al multaj grandaj, mezaj kaj malgrandaj urboj de la tuta lando. Sub la influo de la movado ekplodis en la lasta tagdeko de junio granda striko kun partopreno de pli ol 200,000 ĉinaj laboristoj en Guangdong kaj Xianggang (Hongkong). Sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio la striko daŭris 16 monatojn kaj donis pezan baton al la brita imperiismo en politiko kaj ekonomio. Tiam Ĉinio alfrontis la antaŭvesperon de granda revolucio. En februaro de 1926 la Komunista Partio de Ĉinio okazigis specialan kunvenon, en kiu ĝi decidis sin prepari por fari norden-militiron kontraŭ la militaristoj. En majo de la sama jaro okazis la Tria Tutlanda Laborula Kunveno kaj la Dua Kamparana Kongreso de Guangdong-provinco, kiuj alvokis mobilizi la vastajn amasojn de laboristoj kaj kamparanoj kaj postulis ke la Nacia Registaro de Guangdong rapide komencu norden-militiron kontraŭ la militaristoj.

Tiam la Norden-Ekspedicia Armeo konsistis el 8 korpusoj kun ĉirkaŭ 100.000 armeanoj. Ĝi estis novtipa kaj bone trejnita armeo kun alta batalvolo kaj

revolucia idealo. Aro da eminentaj komunistoj kiel Li Fuchun, Lin Boqu, Zhu Keqing k.a. plenumis politikan oficon en diversaj niveloj de la armeo. Precipe la Sendependa Regimento kun Ye Ting kiel la estro gajnis multajn sukcesojn en la milito pro sia braveco kaj lerteco. En majo de 1926 la Nacia Registaro de Guangdong sendis la Sendependan Regimenton kiel avangardon por militiri al Hunan kaj per tio komenciĝis la uverturo de la Norden-Ekspedicio. La kuomintanga milita ĉefo Jiang Jieshi (Ĉiang Kaj-ŝek), kiu poste perfidis la revolucion, estis nomita ĉefkomandanto de la Norden-Ekspedicia Armeo. En la 1-a de junio publikiĝis "Deklaracio de la Norden-Ekspedicio". En la 9-a la revolucia armeo oficiale komencis sian ekspedicion.

La Norden-Ekspedicia Armeo marŝis en tri kolonoj: La okcidenta kolono plenumanta la ĉefan taskon sin direktis al Hunan kaj Hubei, la meza al Jiangxi kaj la orienta al Fujian. Tiam la trupoj de Wu Peifu okupis Hunan kaj formis plej grandan minacon al la Nacia Registaro de Guangdong, tial la okcidenta kolono kun ĉirkaŭ 50,000 soldatoj marŝis al Hunan kaj Hubei kun celo ekstermi la ĉefajn fortojn de Wu Peifu kaj okupi Wuhan (Vuhan), poste koncentri siajn fortojn por ekstermi la trupojn de Sun Chuanfang kaj fine daŭrigi la militiron norden por ekstermi la trupojn de Zhang Zuolin.

Sur la vojo la Norden-Ekspedicia Armeo ricevis varman akcepton kaj subtenon de diversloka laboristoj, kamparanoj kaj studentoj. Ili meminiacie gvidis ĝin sur vojo, transportis por ĝi

leterojn kaj detruis trafikon en la postfronto de la malamikoj. Iuj eĉ partoprenis en la batalado.

La okcidenta kolono de la Norden-Ekspedicia Armeo kun lavanga forto konkeris gravajn urbojn en sinsekvo kaj sin etendis rekte al Changsha (Ĉangŝa), la ĉefurbo de Hunan. La tieaj malamikoj senreziste forkuris el la urbo. En malpli ol unu monato la Norden-Ekspedicia Armeo okupis la tutan provincon kaj ĝia avangardo eĉ transpaŝis la limon de Hubei-provinco.

Wu Peifu aranĝis siajn trupojn kun 20,000 elitaj soldatoj en la loko Tingsiqiao por haltigi la antaŭenmarŝon de la revolucia armeo. La loko, ĉirkaŭata de alta monto en unu flanko kaj de akvo en la aliaj tri flankoj, estis pasejo tra kiu la Guangzhou-Wuhan-a Fervojo interligas Hunan kaj Hubei. Wu Peifu akiris promeson de Sun Chuanfang ataki la revolucion armeon de la flanko de Jiangxi, por tenajle ataki la revolucion armeon. En la 26-a de septembro la Norden-Ekspedicia Armeo lanĉis ĝeneralan ofensivon al Tingsiqiao. Kvankam ĝi brave batalis kun multaj vivoferoj, tamen ĝi ne povis antaŭenpuŝiĝi pro la obstina kontraŭrezisto de la malamikoj. En la 27-a la revolucia armeo fine konkeris la lokon, dank' al la partopreno de la Sendependa Regimento en la batalo, kiu ekbatis la malamikojn post ties dorso. La Sendependa Regimento faris persekutadon en la venko kaj en la sama tago okupis milite gravan urbon Xianning. En la 29-a la Norden-Ekspedicia Armeo okupis Heshengqiao kaj la malamikoj devis retiriĝi al Wuhan. Tie

Wu Peifu provis organizi helpajn trupojn por fari ofensivon, sed ne sukcesis. En la 10-a de oktobro la Norden-Ekspedicia Armeo konkeris Wuchang (Vučang) kaj plene pereigis la malamikan armeon.

Kiam la Norden-Ekspedicia Armeo marŝis al Hunan kaj Hubei, Sun Chuanfang intencis ataki ĝin de Jiangxi. Pro la mirinde rapida marŝo de la revolucia armeo kaj konfliktoj interne de la malamikoj, lia intrigo ne efektiviĝis. Tamen parto de la propraj trupoj de Jiang Jieshi suferis frakasan malvenkon en la batalo kun Sun Chuanfang por kapti Nanchang, la ĉefurbon de Jiangxi. Post konkero de Wuhan la ĉefaj fortoj de la Norden-Ekspedicia Armeo tuj turnis sin orienten, venkis la trupojn de Sun Chuanfang kaj okupis Nanchang, dume alia trupo de Jiang Jieshi facile okupis Fujian profitante la favoran situacion.

En la nordokcidenta regiono la Nacia Revolucia Armeo gvidata de Feng Yuxiang marŝis en Henan kunagante kun la Norden-Ekspedicia Armeo en junio kaj konkeris gravajn urbojn Zhengzhou (Ĝengĝoŭ) kaj Kaifeng. En marto de 1927, la Norden-Ekspedicia Armeo jam estis okupinta la basenon de Changjiang-rivero (Jangzi-rivero) kaj grandan parton de la baseno de Huanghe-rivero (Flava Rivero), kiuj estis gravaj regionoj de Ĉinio en politiko, ekonomio kaj kulturo. En la dua tagdeko de marto sub la gvido de kamaradoj Zhou Enlai, Luo Yinong, Zhao Shiyan k. a. la laboristoj de Shanghai faris strikon kun 800,000 partoprenantoj kaj armitan insurekcion, profitante la favoran okazon ke

la Norden-Ekspedicia Armeo proksimiĝis al Shanghai. Post intensa batalado de du tagoj kaj unu nokto la laboristoj fine liberigis Shanghai, la plej grandan urbon de Ĉinio, en la 21-a de marto.


Tiam vigliĝis la kamparana movado en provincoj de la meza parto de Ĉinio kaj la kamparana asocio fariĝis unika potencorgano en la kamparo. Kamparanoj en multaj lokoj elmetis pos-

tulon pri agraro kaj komencis mem depreni agraron de bienuloj. La nombro de la membroj de la kamparanaj asocioj en la tuta lando atingis 10,000,000. Kamarado Mao Zedong persone gvidis la kamparanan movadon de Hunan, kie la nombro de la membroj de la kamparanaj asocioj atingis du milionojn. Kun venka disvolviĝo de la Norden-Ekspedicia Milito la Nacia Registaro translokis sian sidejon

de Guangzhou al Wuhan en januaro de 1927.

La venko de la Norden-Ekspedicia Milito skuis la orienton de la mondo kaj teruris imperiismojn kaj la enlandan burĝaron. En tiu tempo iom post iom kreskis la krizo interne de la revolucia unuecfronto, kaj fine la novaj militaristoj de Kuo-mintango kun Jiang Jieshi kiel la reprezentanto faris la kontraŭrevolucion puĉon de la 12-a de aprilo, instigate de imperiismo, kaj fondis en Nanjing reakcian registaron de Kuomintang. La arda Norden-Ekspedicia Milito trafis seriozan malsukceson.

** La nordaj militaristoj estis feŭda militarista kliko fondita de Yuan Shikai. En 1901 kiam li funkciis kiel norda ministro, li fondis armeon nomatan Norda Armeo. En 1912 li uzurpis la prezidantecon, grandigis sian subtenantaron kaj formis militan klikon regantan la centran kaj lokajn registarojn. Post la morto de Yuan en 1916 la nordaj militaristoj dividiĝis en tri klikojn, nome Gili, Anhui kaj Fengtian, kiuj senĉese interbatalis por regpotenco.*



En majo de 1926 la Nacia Revolucia Armeo juris pri norden-ekspedicio. La foto montras paradon de la Nacia Revolucia Armeo en Guangzhou.



La Norden-Ekspedicia Armeo eniris en Wuhan. Ĝi reprenis Wu-chang en oktobro de 1926.



INTERESA SVEDA URBO UPPSALA

de R. RYTENBERG

En la kadro de la venonta Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo okazos inter aliaj ekskursoj ankaŭ vizito al la tre interesa urbo Uppsala, situanta 70 km. norde de Stokholmo. Uppsala kun siaj 100,000 loĝantoj estas la kvara urbo de Svedio. La centron de la urba bildo regas la impona katedralo de la 12-a jarcento kaj precipe la universitato kiu donas al la urbo ĉefan impreson. La Universitato de Uppsala festis antaŭ 2 jaroj sian 500-jaran jubileon, do ĝi estas unu el la plej malnovaj universitatoj en la tuta mondo. Ĝiaj preskaŭ 20,000 studentoj forte kontribuas al la atmosfero de la urbo.

Se oni parolas pri Uppsala, oni ne povas preterpasi la Esperanto-societon, kiu estas ne nur la plej malnova en nia lando sed ankaŭ la dua (post Nürnberg) en la mondo, fondita en 1891 de du tiamaj studentoj Paul Nylen kaj Valdemar Langlet, kies edzino cetere estas filino de la konata en la historio de Esperanto rusa pioniro Borovko.

Inter la ĉefaj vidindaĵoj krom la katedralo superas la urbon ankaŭ malnova kastelo kaj la universitata biblioteko "Carolina Rediviva" kun la plej granda en la nordo librokollektio (pli ol 2 milionoj da volumoj) kaj multnombraj bibliografiaj trezoroj.

Oni devas ankaŭ viziti "Gustavianum", kiu estis antaŭ jarcentoj amfiteatra salono por prelegoj pri anatomio, kaj la kvartalon "studenta urbeto", kie troviĝas loĝejoj por miloj da studentoj, parte ankaŭ iliaj familioj. Fine ni diru ke kun nia universitato estas firme ligitaj la nomoj de profesoro Björn Collinder,

La kastelo de Uppsala apartenas al la vidindaĵoj de ĉi tiu urbo, plej fama pro sia universitato.



mondfama lingvisto kaj esperantisto, membro de la honora patrona komitato de USA, kaj de profesoro Torgny Segerstedt, meritoplana eksrektoro de la universitato, interesita apoganto de Esperanto kaj membro de la honora komitato de la Stokholma kongreso.

KARNAVALO EN GFR

de DING YANGYAN

Karnavalo en la Germana Federacia Respubliko estas tradicia festo de la germana nacio. En tiu antikva festo, la kamparanoj per diversaj aktivadoj prezentas rezistadon kontraŭ demonoj, forpelon de frosta vintro, bonvenigon de printempo kaj esprimas sian deziron pri riĉa rikolto. Ĝi komenciĝas je la 11-a horo de la 11-a de novembro, daŭras ĝis antaŭ 40 tagoj de Pasko kaj atingas sian kulminon en la lasta semajno.

Ekde la komenco de la festo, la popolanoj en grandaj kaj malgrandaj urboj kaj vilaĝoj sin preparas por diversaj aktivadoj kaj elektas siajn "princon" kaj "princinon" por ke ili gvidu la festajn aktivadojn. Ĉar la "princo" kaj "princino" povas sufiĉe paradi dum la festo, ĉiuj mondumaj gesinjoroj klopodas por kapti ŝancon ludi tiujn rolojn. Ĝenerale, tiuj kiuj elspezas plej multe da mono povas esti elektitaj.

La antaŭlasta tago de la festo, nomata "freneza lundo" (ĉar tiu tago estas ĝuste lundo), markas la veran kulminon de la festo. Kaj la lasta jaŭdo de tiu festo estas nomata "Virina Festo", kiu markas la komenciĝon de la kulmino.

En la Virina Festo, virinoj de multaj urboj marŝas grandamase en

la urbodomon por ludi komedian "transprenon de povo", nome ili invadas la kabineton de la urbestro kaj sidiĝas en lian seĝon por montri per tio, ke ili transprenas la regpovon. Foje, kiam mi trapasis la placon antaŭ la urbodomo de Bonno, mi hazarde vidis la finiĝon de tiu komedio. En tiu festo, la viroj estas maltrankvilaj pro tio, ke virinoj tondas surstrate nur iliajn kravatojn, precipe la elegantajn, por ilin fiksi sur muro en sia domo kiel trofeojn.

En la "freneza lundo" okazas manifestacio de alivestitoj kaj amaskunveno por distrado kaj granda balo. La partoprenantoj en la manifestacio ĝenerale portas antikvajn kostumojn, precipe militistajn uniformojn de la tempo de Napoleono. En la procesiaj kolonoj iras bele ornamita veturilo, kie sidas la "geprincoj", kiuj disŝutas survoje bombonojn, fromaĝajn kuketojn kaj ludiletojn al homplenaj lokoj por saluti la amasojn. Dum tia procesio en iuj urboj dekoj da tunoj da bombonoj estas disdonitaj.

La grandiozaj amuza kunveno kaj balo daŭras ĝis noktomezo. Krom ili, oni aranĝas, dum la karnavalo, ankaŭ malgrandajn balojn diversloke.

HUMURO DE GABROVO

de GE MAOCHENG

En centra Bulgario troviĝas urbetto kun 70,000 loĝantoj nomata Gabrovo, kiu estas konata kiel Urbo de Humuro.

En la urbocentro estas 5-etaĝa domo de muzeo, en kiu kolektiĝis humuraj kaj satiraj pentraĵoj kaj

skulptaĵoj. Tiuj verkoj kun akre pika enhavo ofte vekas bruajn ridojn ĉe la rigardantoj. Monda ekspozicio de karikaturoj okazas en ĉiuj du jaroj en tiu urbo kaj majstroj de tiu pentroarta branĉo de multaj landoj kaj regionoj konkure sendas siajn verkojn al ĝi por montri al la publiko.


Ankaŭ la gabrovanoj estas tre humuraj kaj ilia spriteco strikte ligiĝas kun ilia ŝparemo. Ekzemple, la emblemo de Gabrovo estas senvosta kato. Pri tio ĉirkuilas vaste jena legendo: La gabrovanoj detranĉis

la vostojn de siaj katoj pro tio, ke la senvostaj katoj bezonas malpli longan tempon por malfermo kaj refermo de la ĉambropordoj dum sia en- kaj eliro en vintro, kio estas utila por teni la varmon en la ĉambro kaj ŝpari monon por hejtado.

Inter la humuraĵoj ĉirkuilantaj en Gabrovo multaj estas tiaj spritaĵoj. Ekzemple, alia humuraĵo diras, ke oni ne aĉetu ŝtipojn rektajn sed malrektajn kun nodoj por hejtado, ĉar por hake spliti ilin oni devas multe peni kaj povas sin varmigi per tio.


La humureco kaj ŝparemo de la gabrovanoj estas tradiciaj. Oni diras, ke frue en la 17-a kaj 18-a jarcentoj, iliaj prapatroj jam estis tre lertaj en komercado kaj ekonomia uzado de mono. Kaj hodiaŭ la gabrovanoj sentas fierecon estante nomataj ŝparemuloj. Ili diras, ke filozofo Kantio opiniis, ke nur per forlaso de luksemo oni povas eviti financajn malfacilojn. Tial ili pensas, ke humuro por la nacio similas sangon por la homo. Kiel la nacio povus vivi sen humuro?

KARIKATURO



Transporto de trabo

Pentrita de XIE ZHAOXU



Senplaneco

Pentrita de
LU MIAOKUN



Lasero

Pentrita de
NUO ERXIAO



NANJING-A INTERNACIA VIRINA FLUGPILKA INVITA TURNIRO

La nomita turniro finiĝis la 9-an de majo. La ĉina teamo gajnis la ĉampionecon, venkinte la japanan teamon per 3:0. La japana teamo gajnis la subĉampionecon kaj la usona teamo la trian lokon. En la ferma parolo Wu Zhen, prezidanto de la organiza komitato de la turniro, diris, ke tio estas internacia virina flugpilka konkurso kun monda nivelo kaj ankaŭ renkontiĝo de sportistinoj en granda amikeco.

FERMIĜO DE LA SHANGHAI-A INTERNACIA TABLOTENISA TURNIRO

Je la 2-a de majo, fermiĝis en Shanghai la nomita amika invita turniro, en kiu partoprenis spor-

La ĉampionoj de la gea parludo Wang Huiyuan kaj Cao Yanhua (la dekstra)



Ĉina flugpilkistino en pilko-frapo

tistoj el la Korea Demokratia Respubliko, Francio, Svedio, Japanio, Ĉinio kaj Xianggang (Hongkong). La ĉinaj sportistoj gajnis la ĉampionecon de ĉiuj 5 disciplinoj. La vira solluda ĉampiono estas Wang Huiyuan, la virina solluda ĉampiono — Cao Yanhua, la viraj parludaj ĉampionoj — Li Zhenshi kaj Wang Huiyuan, la virinaj parludaj ĉampionoj — Qi Baoxiang kaj Geng Li-

juan, kaj la geaj parludaj ĉampionoj — Wang Huiyuan kaj Cao Yanhua.

AŬSTRALIA PENTRISTO EN ĈINIO

De la 25-a de marto ĝis la 22-a de aprilo, la famkonata aŭstralia pentristo s-ro Sidney Nolan kaj lia edzino faris amikan viziton al nia lando. Ili vojaĝis kaj pentris en la provincoj Yunnan kaj Sichuan kaj la urbo Datong.

ĈINA VIOLONISTO EN AŬSTRALIO

Invitite de la Aŭstralia Brodkasta Kompanio, ĉina juna violonisto Sheng Zhongguo vizitis 6 urbojn de Aŭstralio en aprilo. Li ludis en 12 koncertoj eŭropajn klasikajn verkojn kaj ĉinajn muzikaĵojn "Liang Shanbo kaj Zhu Yingtai" kaj "Ĉe Ora Fornego". Lia ludo estis multe laŭdata de la aŭstraliaj aŭskultantoj.

**INTERNACIA LASERA
SIMPOZIO DE 1980**

La nomita simpozio iniciatita de la Ĉina Optika Asocio okazis unue en Shanghai (Ŝanhajo) de la 5-a ĝis la 8-a kaj poste en Beijing (Pekino) de la 19-a ĝis la 22-a de majo. Ĝin ĉeestis pli ol 60 famaj sciencistoj el Usono, Japanio, FR-Germanio, Francio, Aŭstrio, Britio, Italio kaj Svisio, kaj pli ol 60 ĉinaj sciencistoj de la du urboj. Dum la kunvenado ili voĉlegis ĉ. 100 disertatojn, kaj samtempe estis eksponitaj nov-tipaj laseraj instrumentoj de pli ol 10 eksterlandaj kompanioj.

**FRANCA VIOLONISTO
EN BEIJING**

Meze de aprilo, la juna franca violonisto Jean Mouillere vizitis nian ĉefurbon Beijing kaj ludis "Poemon" de Ŝopeno, "Ciganon" de Maurice Ravel kaj la "Violonan Konĉerton en D Majora" de Betoveno en la simfonia koncerto okazigita de la Centra Filharmonio de Ĉinio. Lia ludo estis admirata de la ĉinaj aŭskultantoj.

**STUTTART-A BALETA
TRUPO EN ĈINIO**

En aprilo la Stuttgart-a Baleta Trupo de FR-Germanio vizitis Ĉinion. Ĝi prezentis en Beijing kaj Shanghai baletojn "Eugene Onegin" kaj "Romeo kaj Julieta". La grupo gvidata de la fama baletistino Marcia Haydee estas unu el la famkonataj baletaj trupoj de la mondo. La geaktoroj akiris varmajn aplaŭdojn de la ĉinaj rigardantoj per siaj brila tekniko, bela muziko kaj unika dekoracio.

**EN BEIJING OKAZIS
EKSPOZICIO DE PENTRAĴOJ
DE BRITAJ MINISTOJ**

Je la 25-a de aprilo malfermiĝis en la Ĉina Belarta Domo la nomita ekspozicio kun 45 pentraĵoj kiuj priskribas laboron kaj vivon de ministoj de la norda Britio en la tridekaj kaj kvardekaj jaroj. Ili estis kreitaj de membroj de la grupo de laboristaj belartaj amatoroj de Ashington-minejo en la norda Britio dum la periodo de 1935-1955.

**LA ĈINA YUNNAN-PROVINCA
PEKIN-OPERA
TRUPO EN FRANCO**

En aprilo la nomita trupo vizitis Lionon kaj Parizon. La geaktoroj de tiu trupo estrata de fama artistino Guan Sushuang faris brilan

prezentadon kaj ricevis laŭdojn de francaj spektantoj. Francaj ĵurnaloj aperigis novaĵojn, artikolojn kaj fotojn pri la sukcesa prezentado de la ĉinaj artistoj.

**ĈINAJ ENVAZAJ MINIATURAJ
PEJZAĜOJ EN LA INTERNA-
CIA FLORA FOIRO DE GAND**

En aprilo inaŭguriĝis la foiro, kaj la ĉinaj envazaj miniaturaj pejzaĝoj altiris al si multajn vizitantojn, kiujn precipe mirigis iuj herboj, arboj kaj florplantaĵoj vivantaj en vazoj jam 10, 50 aŭ eĉ 150 jarojn.

Gand estas urbo en la norda Belgio. La ekspoziciejo el forcejoj vastas 26,000 kvadratajn metrojn. Tie montriĝis floroj kaj aliaj ĝardenaj plantaĵoj de Belgio, Nederlando, Luksemburgio, Ĉinio, Francio, Italio, Usono, Kanado, la Ebura Bordo kaj aliaj sume 14 landoj.

Nova libro

**Jus eldonita de El Popola Ĉinio
El Ĉina Poezio**

Kolekto el cent poemoj de antikvaj kaj modernaj poetoj de Ĉinio. Inter ili troviĝas famaj ĉinaj poetoj Li Bai, Du Fu, Bai Juyi kaj ankaŭ Guo Moruo, Xu Zhimo, Wen Yiduo k.a.

La tradukinto estas eminenta ĉina esperantisto Prof. S. J. Zee. Iuj el liaj tradukaĵoj kaj originalaj poemoj iam publikigis en "Literatura Mondo". En tiu ĉi libro estas ankaŭ artikolo pri la ĉina klasika poezio, kiun li speciale skribis por la esperantistaj legantoj.

148 × 210mm. 156 paĝoj
Numero: 10Es-1526
Prezo: broŝ. £2.40 US\$4.90
bind. £2.90 US\$5.90



Mendu ĉe:

**Peranto de "El Popola Ĉinio" en via lando
Universala Esperanto-Asocio
Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN,
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio**

**LA ĈINA INDUSTRIIA
KAJ AGRIKULTURA
PRODUKTOVALORO EN 1979**

Laŭ anonco de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio, la totala industria kaj agrikultura produktovaloro de nia lando en 1979 atingis 617,500 milionojn da juanoj kaj kreskis je 8.5% kompare kun tiu de 1978. La nacia enspezo (nome la neta produktovaloro) de produktaj fakoj atingis 337,000 milionojn da juanoj. Tiu sumo estas je 7% pli alta ol tiu de la antaŭa jaro.

**4 PROPONOJ DE CK
DE KPC PRI LA
KONSTRUADO DE BEIJING**

Lastatempe la Sekretariejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio diskutis pri la laboro de Beijing kaj prezentis 4 proponojn pri la konstruado kaj laboro de tiu urbo: 1. faru Beijing modelo de la tuta lando en socia sekureco, socia ordo kaj moralo kaj unu el la plej bonaj urboj de la mondo; 2. faru al ĝi median reformadon kaj arboplantadon, plibonigu ĝiajn higienajn kondiĉojn kaj konstruu ĝin en unuaklasan kaj puran modernan urbon belan, utiligante ĝiajn montojn, akvojn kaj historiajn lokojn; 3. faru Beijing urbo kun plej alta nivelo de kulturo, scienco, teknikoj kaj edukiteco en nia lando; kaj 4. havigu al ĝi prosperan ekonomion kaj al la urbanoj stabilan kaj oportunan vivon. Nun la Beijing-a popola registaro faras planon, por ke la fizionomio de la ĉefurbo ŝanĝiĝetu en 3 jaroj, ŝanĝiĝu mezgrade en 5 jaroj kaj ŝanĝiĝegu en 10-15 jaroj.

**BEIJING-TONGLIAO-A
FERVOJO FINKONSTRUITA**

Je la 1-a de majo ekfunkciis la nomita fervojo. Ĝi estas la dua

trunka fervojo de norda Ĉinio kondukanta al Tongliao de la Interna Mongolio. La fervojo kun longeco de 806 km. etendiĝas de Changping en la norda parto de Beijing norden ĝis Tongliao.

**MALRAPIDIĜAS LA NATURA
KRESKADO DE LA
ĈINA LOĜANTARO**

Laŭ statistiko farita de la Naskolimiga Oficejo de la Ŝtata Konsilantaro, la natura kreskado de la ĉina loĝantaro en 1979 estis 1.17%, iom malpli alta ol tiu de la antaŭa jaro.

La tagjurnalo «Beijing Ribao» raportis: La meznombra vivdaŭro de la urbanoj de Beijing superis 70 jarojn. En 1979, tiu de la viroj atingis 69.51 jarojn, kaj tiu de la virinoj 72.26 jarojn.

OBSERVADO DE SUNMAKULOJ

Observado de la Zijinshan-a Astronomia Observatorio en Nanjing montris, ke en la komenco de aprilo, sur la surfaco de la suno aperis du grandaj grupoj de makuloj en nelonga distanco unu de la alia, ili sin movis okcidenten kaj perdiĝis ĉe la rando de la suno.

La totala areo de tiuj du grandaj grupoj de sunmakuloj okupis 0.3% de hemisfera areo de la suno kaj estis dekkelk-oblo de la areo de la terglobo. La du grupoj etendiĝis je 400,000 km., kaj ili estis relative grandaj grupoj de sunmakuloj en la suna aktiva periodo kaj disvolviĝantaj en eksterordinara rapideco. La plej granda eksplodo de la sunmakuloj rompita kurtundan komunikadon.

**ENKORPA EKSPLODA TERAPIO
POR FORIGI KALKULUSON**

Antaŭ nelonge Ĉinio unufoje aplikis enkorpan eksplodan terapion al litiaza paciento. Kuracistoj de la urologia fakoj de la Xi'an-a Centra Hospitalo enigis per aparato mikrobombon en la vezikon de iu

malsanulo laŭ lia uretro kaj faris unudirektan eksplodigon. Aŭdiĝis "krak!" kaj la kalkuluso rompiĝis en 4 pecetojn, kiuj poste estis elprenita tra la uretro, tamen la veziko estis neniom difektita. La malsanulo sentis nur paralizan skueton je la malsupra abdomeno.

**LA UNUA SUBTERA NATUR-
GASA TENEJO DE ĈINIO**

Kvinjara provuzado de la nomita naturgasa tenejo konstruita ĉe Daqing en 1975 montris, ke ĝi bone funkcias, kaj ĝi estis oficiale transdonita al regula uzado. Dum la provuzado, ĉ. 50 milionoj da kubmetroj da naturgaso estis enpumpitaj kaj elprenitaj kaj tiu kvanto egalas 50,000 tunojn da nafto. Antaŭ la ekfunkcio de tiu tenejo, oni devis forbruligi la superfluan naturgason en somero kaj alfronti nesufiĉecon de ĝi en vintro. Per la subtera tenejo oni povas rezervi la superfluan naturgason somere por uzado en vintro. Por tenadi naturgason, antaŭe nia lando uzis ĉefe grandajn ŝtalajn ujojn, kies konstruado bezonis grandan kvanton da ŝtalo. Sed por la konstruado de la nomita subtera tenejo oni uzis nur malmulte da mono kaj materialo.

**LA ŜIPO FOSHAN LEVITA
EL MARO**

Post dumonata klopodado, ĉina ŝiposava taĉmento sukcese levis la rompitan ŝipon Foshan el la maro proksime de Xianggang (Hongkong) en la komenco de majo, 1980. Tiu pasaĝera ŝipo de 2,600 toneloj veturadis sur la linio de Xianggang ĝis Aomen kaj dronis je la 16-a de aŭg. 1971 pro fortega tajfuno. La savado estis farita laŭ peto de du kompanioj de Xianggang.

La Ĉina Kompanio de Helpado kaj Savado al Rompitaj Ŝipoj donis helpon al 42 ŝipoj, inter kiuj estis 12 fremdlandaj, elmarigis 45 rompitaĵojn kaj 6,173 tunojn da diversaj materialoj en la pasinta jaro.

**ARTIKOLOJ PRI ESPERANTO
EN ĈINAJ JURNALAJ
KAJ GAZETOJ**

41 ĉinaj ĵurnaloj kaj gazetoj en 1979 kaj 25 ĝis la unua tagdeko de majo de 1980 publikigis artikolojn pri Esperanto kaj aktivecoj de Esp-organizo en siaj lokoj.

La plej granda tagĵurnalo de Ĉinio "Renmin Ribao" publikigis en la rubriko "Militkampo" la artikolon de verkisto-esperantisto Ye Junjian (Cicio Mar) pri la 64-a Universala Kongreso de Esperanto. La vaste influanta tagĵurnalo "Guangming Ribao" publikigis artikolon pri la japana esperantistino Hasegaŭa Teru (Verda Majo). La "Bulteno de Jilin-a Normala Universitato" publikigis artikolon de Lü Yuanming kun la titolo "La vojo de dua venko" pri la vivo de Hasegaŭa Teru en la liberigita regiono de la Nordoriento. La gazeto "Legado" kaj la tagĵurnalo "Neimenggu Ribao" respektive publikigis artikolon pri la rusa blinda poeto Eroŝenko, kiu instruis Esperanton en Ĉinio en la dudekaj jaroj.

Krom tio, la Centra Radio kaj 7 lokaj radiostacioj kaj televiziaj stacioj diskonigis Esperanton aŭ disaŭdigis esperantajjn kantojn.

**ĈINAJ KAJ AŬSTRALIA
ESPERANTISTOJ EN
LA SOMERA PALACO
DE BEIJING**

La 28-an de aprilo, aŭstralia esperantisto sinjoro Errol Chick kaj lia edzino venis al Beijing kiel membroj de la vizitgrupo de la Aŭstralia-Ĉinia Amikeca Asocio. Ili kaj 4 esperantistoj de Beijing ekskursis en la pitoreska Somera Palaco.


**E-KURSO EN TIANJIN,
TAIYUAN KAJ HENAN**

En la fino de marto finiĝis la unua esperanta kurso funkciigita de la Prepara Grupo por la Fondiĝo de la Tianjin-a Esperanta Asocio. En la 17-a de aprilo komenciĝis la dua kurso. Maljuna verkisto-esperantisto Lao Rong kaj esperanta poeto Armand Su havis paroladon kun la

kursanoj. Al la du kursoj donas lecionojn instruisto Li Yudong de elementa lernejo.

La esperanta kurso de Taiyuan inaŭguriĝis en la Kultura Palaco de la urbo, la 17-an de aprilo. Ĝi havas 83 kursanojn kaj estas instruata de inĝeniero Zhang Deyuan.

En la gubernio Wenxian de la provinco Henan 3 esperantistoj fondis esperantan kurson, en kiu lernas 40 personoj.



En la dua Esperanto-kurso de Tianjin, Ĉinio



RARA BIRDO—BONAZIO

La birdo bonazio (*Tetrastes bonasia amurensis*) vivas en la Malgranda Xing'an-montaro de nordorienta Ĉinio kaj estas rigardata kiel unu el la raraj birdoj. Jam de la komenco de la 14-a jarcento ĝi estis tributita de la tieaj nacimalplimultoj al imperiestroj. Nun oni surtabligas bongustajn bonaziajn pladojn en nacia festeno por regali respektatajn gastojn el aliaj landoj.

Eĉ nespicita supo el viando de bonazio jam povas tikli la nazojn de ĉiuj ĉirkaŭaj personoj. La blanka viando en la supo povas esti klare vidata. Se oni kuiras ĝian viandon kune kun alispeca viando, la lasta

fariĝas bongusta same kiel la antaŭa.

Bonazio pezas ĝenerale 300-450 gramojn. Ĝia brusta viando konsistigas preskaŭ duonon de la korpopeso. Ĝiaj plumoj estas griz-brunaj. Ĝi havas plumtufon sur la kapo, mallongan bekon kaj maldikajn sed longajn ungojn. Sub ĝia beko estas nigra plumtufo ruĝranda. Ĝi prenas diversajn arbosemojn, sovaĝajn fruktojn kaj junajn arbofoliojn kiel sian nutraĵon. La bonazioj vivas arope. Ĉiu aro konsistas el 30-40. En ŝtorma tago ili faras por si neĝan neston. Ili pariĝas en aprilo kaj majo. Kaj post 4 monatoj iliaj idoj jam povas vivi memstare.



**PREMIO AL ĈINAJ
ELSTARAJ TEATRAĴOJ**

En la 8-a de aprilo okazis en Beijing (Pekino) kunveno, en kiu oni premiis 231 elstarajn dramojn, operojn, baletojn, dancojn, ĉjuĵiojn, akrobataĵojn kaj pupteatraĵojn prezentitajn por celebri la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

La prezentado estis impona arta festivalo, kiu daŭris de la 5-a de januaro 1979 ĝis la 9-a de februaro 1980. Ĝin partoprenis 127 prezentitaj trupoj el 29 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, kaj el la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Ili prezentis 1,428 fojojn kaj akceptis 1,830,000 rigardantojn.

**SCIENCAJ KAJ TEKNIKAJ
ATINGOJ ESTIS PREMIITAJ**

Lastatempe la Ĉina Akademio de Sciencoj premiis 232 gravajn sciencajn kaj teknikajn atingojn, el kiuj 56 ricevis la unuagradan premion kaj 176 la duagradan. En la

pasinta jaro la institutoj sub tiu akademio havis sume pli ol 1,500 sciencajn kaj teknikajn atingojn, je ĉ. 30% pli multe ol en la jaro 1978. Inter ili estas atingoj en fundamenta esploro, tiuj en apliko de fundamenta esploro kaj tiuj en apliko de esploro kaj disvastigo de esploro.

**FILMA KUNLABORO INTER
ĈINIO KAJ KANADO**

La Ĉina Filma Kunlabora Korporacio kunlaboros kun la Internacia Kinokorporacio de Montreal, Kanado, en la produktado de filmo pri la vivo de Norman Bethune. La Filma Studio "La 1-a de Aŭgusto" de Ĉinio partoprenos en filmado.




Norman Bethune estis fama kanada ĥirurgo. Printempe de 1938 li venis al la Shanxi-Chahar-Hebei-a revolucia bazloko tra Yan'an, la tiama centro de la ĉina revolucio. Li helpis savi la vunditojn en la batalo kontraŭ la japanaj agresantoj kaj oferis sian vivon por la liberiga afero de la ĉina popolo.




FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ

Animaloj kaj vegetaloj en Mediteraneo kaj
Adriatiko. 30-50 metrojn sub la akvo, somere
de 1979

de ANDRÉ PIERARD (Belgio)





Pejzaĝo de Xishuangbanna

Ĉinaj lakaj pentraĵoj

Profunde en bambuaro

de HUANG KUANGBAI





de ZHU YAOKUI

Lakaj pentraĵoj estas kreitaj per tekniko de farado de lakajoj, kaj diferencas de alispecaj pentraĵoj en arta karaktero kaj gusto. Por fari tion, nigra, ruĝa kaj diafana lakoj, oro, arĝento, perlamoto, ovoŝelo kaj aliaj materialoj estas uzataj kaj la teknikoj de gravurado, ajurado, inkrustado, plenigo, orumado kaj aliaj estas uzataj, tiel ke la artaĵoj impresas antikvaĵe kaj pompe.

Knabino en la suda parto de Fujian-provinco

de QING CHUAN



Oraj fiŝoj

de LIANG RUCHU kaj CHENG QIUFANG



